



ESPERANTO

APRILIO 1963

56a Jaro - N-ro 689 (4)

esperanto

REVUO INTERNACIA

APRILIO 1963

56 a J A R O

N-RO 689 - (4)

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion por redakto oni sendu al la Centra Oficejo.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono: (010) 3 27 88. Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1963): 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 pago 128,— gld, $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld, $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld. $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld, $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 84 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Hideo Yagi, prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes O.B.E., Vic-prezidanto, 38 Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

D-ro André Albault, estrarano pri kulturaj aferoj kaj kongresoj, 8 Avenue Etienne Billières, Toulouse, Francujo.

S-ro Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odýnca 73/100, Warszawa, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

S-ro Sv. Ziegler, helpa sekretario, Kystvej 10, 2 th., Aabenraa, Danlando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 6/57, Svislando.

FRONTPAĜA BILDO:

La Bulgara Nacia Opero. Bulgaraj operkantistoj partoprenos la 2-an Internacian Artan Festivalon en Sofio.

Enhavo

La Beograda Konferenco (Vukomanović)	61
Laborplano de loka societo (I.L.)	61
Esperantistoj, pliakiviĝu ! (Wensing)	62
Laborplano de KKK (SEK) Kopenhago	65
"Esperanto estas plej bona" — Ciolkovskij (Kulikov)	66
Enkonduko de Esperanto nun !	67
Historio pri knabo, kiu famiĝis (Ginz)	68
UEA kandidato por Nobel-Pacpremio 1963	69
Letero al infano	76
Geonkloj Esperantistaj	77

Rubrikoj

Novaj libroj	70
Ricevitaj eldonaĵoj	72
Tra la Mondo	73
Laŭfake	73
Esperantista Vivo	73
48-a U.K. Sofio	74
La Juna Vivo	75
Radio	76
Ni citas	76
Ŝako	77
Memoriga kalendaro	78
Oficiala informilo	78
Internaciaj konkursoj	79

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO


(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

esperanto, aprilo 1963

LA BEOGRADA KONFERENCO

KAJ INTERŜTATA KONVENCO PRI LA ENKONDUKO DE ESPERANTO EN LERNEJOJN

(Okaze de la Internacia Konferenco de la lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata, Beograd, 28-7—1-8-'63)



Esperanto kaj Esperantismo fariĝas ne nur ĉiam pli rekonata fenomeno sed ankaŭ la evidenta bezono de la hodiaŭo. La venko de Esperanto, videbla ĉe la horizontoj, komenciĝis efektive ekde tiu momento kiam la esperantistoj al Esperanto komencis fiksi ĝustajn rolon kaj lokon en la praktiko. Por venki en la praktiko estas necesa samtempa luktado sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco. Tamen, la avantaĝon oni donas al la lernejoj ĉar enkonduki Esperanton en lernejojn en sia plena esenco signifas *konkeri vastegan bazon por la plua venko en la praktiko*. Liverante amason da novaj kaj junaj esperantistoj la lernejoj dissemos ilin en la plej diversajn branĉojn de la homa agado. Pro tio, la lernejoj estis kaj restis nia unua kaj ĉefa zorgo.

En multaj landoj la Esperanto-movado atingis gravajn komencajn rezultojn rilate al la enkonduko de Esperanto en lernejojn. Montriĝis nun la bezono pridiskuti tiujn atingajojn, analizi ĝisnunajn spertojn kaj rezultojn, kritike pritrakti niajn konceptojn kaj taktikon, nian tutan porlernejan laboron.

Sed la pli grava tasko de la Konferenco estas pridiskuti kaj prilabori ĉiujn eblecojn per kiuj E-instruado en lernejoj povas kontribui al la progresigo kaj modernigo de ĝeneralaj instruado kaj edukado. Sen tio, nia agado en lernejoj estus senviva kaj senperspektiva. Kun tio, ni atingos la simpatiojn de la pedagogia publiko, neesperantista instruistaro, ŝtataj organoj, gelnantaj gepatroj kaj gelernantoj mem.

Se la Konferenco en Beograd sukcese faros ambaŭ taskojn (tio povas okazi nur per multnombra partopreno al la Konferenco kaj aktiva faka laboro je efektiviĝo de ĝia programo) ni povos esperi ke la grundo por konkeri la Interŝtatan Konvencion pri la enkonduko de Esperanto en lernejojn estas bone preparita. Oni ne rajtas forgesi ke la rezultoj de la Konferenco, ĝiaj resolucioj kaj sistemigitaj argumentoj estos prezentataj al ĉiuj ministerioj por lernejaj aferoj en opaj landoj, pedagogiaj institucioj kaj organizaĵoj, ankaŭ al UNESKO. Krome, la oficialaj observantoj ĉiukaze raportos pri siaj impresoj esprimante siajn opiniojn kaj proponojn. Ne permesu, karaj gekolegoj, ke tiuj argumentoj estu palaj ĉar efektive ili ne estas tiaj! Ilin ni havas, ili estas imponaj kaj povas esti influaj, sed ni devas ilin kune prilabori.

Unu el la historiaj momentoj por la E-movado ekfajreriĝos en la tagoj de la Beograda Konferenco. Ĉu ĉiuj esperantistoj, precipe esperantistaj fakuloj — instruistoj laboregantaj en lernejoj, konscias pri ĝi? Ĉu ili kapablos el tiu fajrero bruligi fajron?

Ili kapablas kaj devas tion fari ĉar de ili tion postulas la historio!

Petar Vukomanović

LABORPLANO DE LOKA SOCIETO

Apenaŭ necesas emfazi la gravecon de la lokaj Esperanto-grupoj. Ili troviĝas en la Fundamento mem de ĉiuj aliaj niaj organizaĵoj, de la tuta Esperanto-Movado. De ilia pli aŭ malpli efika laboro dependas la pli aŭ malpli rapida progresado de la Internacia Lingvo en landaj kaj mondaj kadroj. Tial la Dua Baza Laborplano de U.E.A. dediĉas apartan atenton al la lokaj societoj. La punktoj 13 kaj 26 rilatas al ili. Tie troviĝas nombro da sugestoj pri internaj taskoj kaj ekstera agado, kiujn, depende de la lokaj cirkonstancoj kaj eblecoj, ĉiu loka grupo devus klopodi realigi ĝis maksimumo.

La gvidaj instancoj de diversaj Esperanto-organizaĵoj, aliĝintaj al U.E.A. aŭ ligitaj al ĝi per kontraktoj, bone ekkomprenis la gravecon de laŭplana laboro kaj komencis ellaboradi siajn agadprogramojn. Inter ili estas pluraj landaj asocioj kaj gravaj lokaj societoj, kies kompetentaj organoj jam akceptis siajn proprajn laborplanojn.

Unu el la plej trafaj laborplanoj, ĝis nun ellaboritaj de la lokaj grupoj, estas tiu de la Kleriga Konversacia Klubo, nun kunfandiĝinta kun la Studenta Esperanto-Klubo en Kopenhago, kiun ni publikigas komplete en tiu ĉi numero. La Laborplano de tiu klubo celtrafe kunligas la 3 ĉefajn agadojn de ĉiu Esperanto-organizaĵo sur loka nivelo: instruadon, informadon kaj internan vivon. La ĝeneralaj principoj, formulitaj en la Baza Laborplano de U.E.A., estas konvene adaptitaj al la lokaj kondiĉoj kaj al la disponeblaj fortoj de la klubo. Aliflanke, la Laborplano havas ankaŭ kelkajn tre utilajn erojn, kiujn ne antaŭvidas la Laborplano de U.E.A. Aparte menciinda kaj salutinda estas la punkto 31 rilate la kontaktojn kun eksterlandaj Esperanto-societoj kaj adopton de loka grupo en Azio aŭ Afriko por certigi ĝian ekzistadon. Efektive, diversaj Esperanto-organizaĵoj, fonditaj lastatempe en Azio kaj Afriko, tre bezonas helpon kaj moralan apogon fare de la pli fortaj Esperanto-societoj.

La Laborplano de K.K.K. (S.E.K.) povas esti konsiderata kiel imitinda modelo por la aliaj lokaj Esperanto-organizaĵoj. Tio ne signifas, ke estas konsilinde blinde ĝin transskribi. Tute male, ĝi servu nur kiel ekzemplo. La aliaj lokaj grupoj ellaboru siajn proprajn planojn, kiuj povos enteni pli vastan programon — ekzemple pli oftajn kunvenojn aŭ havigon de propra ejo — aŭ malpli ol la Laborplano de K.K.K. (S.E.K.).

I. L.

ESPERANTISTOJ, PLIAKTIVIĜU!!

Kiel ĉiu korpo, ankaŭ la homo posedas denaturan, kunnaskitan inertecon. La homa menso, nia spirito, oftfoje kontraŭstaras pasive, nekonscie agemon kaj aktivecon. Por ke ĝi ĉiufoje energie ekfunkciu, ĝi bezonas impulsojn konstante ripetitajn. Nur kelkiuj estas dotitaj de daŭre brulanta agadpreteco; malmultaj estas la nelacigeblaj aktivuloj kiuj, seninstige, ekkaptas ĉiajn okazojn por satigi sian energion.

Normale tio tute ne gravas. Kia nevivinda frenezulejo fariĝus nia terglobo se ĉiuj seninterrompe ageme kuregus kaj malriposus por realigi kiun ajn celon.

Sed ni, Esperantistoj, ni estu konsciaj ke ni estas vokitaj por plenumi gigantan mision. Nia kolosa tasko nepre ne permesas, ke ni endormiĝu, kredante kaj fidante ke aliaj faros la ĉiutagan pioĉadon sur la tereno kulturenda.

Se iu movado staras vidalvide kun mondaleksa tasko, tio vere estas la internacia Esperanto-movado, vi kaj mi, ĉiu unuopulo en niaj rangoj. Ni bezonas ĉiujn fortojn, ĉies talenton kaj energion sur ĉiu ajn kampo. Se ie ne devus ekzisti etburĝaj intrigoj, ĵaluzo, personaj kvereloj, malpaco aŭ prestiĝproblemoj estas en nia samideana komunumo. Ĉiu ereto da energio perdiĝinta pro negravaj, bagatelaj aŭ pure privataj konsideroj, fakte estas krimo, ĉar, antaŭ la mondreforma devo plenumenda, estas netolereble ke ni forkonsumu nian tempon pro sensignifaĵoj. Kontraŭe, ni estu grandanimaj, mondburĝaj kaj ofereme sindonaj, konsciantaj pri la nerifutebla fakto ke ankaŭ hodiaŭ pionira sango

ankaŭ venkas barojn, transboras obstaklojn.

Kial mi skribas tiujn vortojn? Pro la fakto ke ankaŭ nia movado jam tro suferas pro indiferenteco, mezkvaliteco, manko de inspiraj, konvinkaj ekzemploj. Laŭte ni disaŭdigas ke neniam antaŭe U.E.A. havis tiom da membroj; ni ĉiuj ĝojas pro la multnombra aliĝado al la venonta U.K. en Sofio; volonte ni iom fanfarone propagandas la impresan nombron de libroj kaj gazetoj eldonitaj en Esperanto, sed kion ekscias la ekstera mondo pri nia agado? Ĉu ni, fidelaj samideanoj, ne tro kaŝas nian lumon anstataŭ ekbriligi ĝiajn radiojn en la publikan vivon? Ni babilas laŭte kaj kantas gaje en niaj klubrondoj, sed ĉu nia voĉo sufiĉe aŭdiĝas en gazetoj, radio, gazetaro? Ni korespondas regule kun eksterlandaj amikoj kaj ŝanĝas poŝtmarkojn, sed ĉu vi iam serioze klopodis atentigi vian entreprenestron, direktoron, liceestron aŭ kiun ajn pri la granda praktika valoro kiun Esperanto povas havi por internacia komerckorespondo, interŝanĝo de varoj, informado pri sciencaj temoj?

Unu el la plej gravaj ĵurnaloj de Okcident-germanujo kaj eble de Okcident-eŭropo, la "*Frankfurter Allgemeine*" publikigis, en sia numero de la 5-a de marto, artikolon verkitan de Hanni Konitzer, Vieno, kiu trafe pritraktas la problemon kiun ni ĉiuj sentas sed kiun solvi ni nur kapablas se ni celkonscie eltiras nin el nia inertecon, ekmarŝas plenfide en la publikecon, atakante la indiferentecon, la misprezentojn kaj falsajn ideojn.

Jen la teksto de la artikolo:

Mondhelplingvojn neniu volas

ESPERANTO, ĜIAJ SUKCESOJ KAJ ĜIAJ SENILUZIIĜOJ

Vieno, komence de marto

En ĉiuj landoj la Esperantistoj rigardas Vienon kiel sian Mekon. Estas vere ke la Centroj de la Internacia Esperanto-Movado troviĝas en Rotterdam, Ĝenevo kaj Londono, sed la Viena "Hofburg" gastigas la unusolan Esperanto-Muzeon en la mondo. Tien pilgrimas de malproksime inspiritaj Esperantistoj kiuj, vidante la tie kolektitajn pruvaĵojn atestantajn pri la disvolviĝo kaj disvasteco de Esperanto, ĉerpas novajn fortojn por sia revo ke iun tagon tiu ĉi artefarita lingvo ekkomencu sian triumfon ĉirkaŭ la terglobo. La Viena Esperanto-Muzeo, el kulturhistoria vidpunkto, prezentas interesajn trezorojn. Pro tio estas bedaŭrinde ke, ekster la Esperantistoj, nur tiom malmultaj — eĉ ne la Vienanoj mem — scias pri tiu unika kolektaĵo en la koro de Vieno. Dekmilo da libroj kaj verkaĵoj — esperantlingvaj eldonoj de kla-

sikaj verkoj mondliteraturaj irantaj de Odiseo de Homer kaj Dia Komedio de Dante trans Shakespeare, Molière, Goethe kaj Schiller ĝis Rabindranath Tagore, sed ankaŭ altnivele sciencaj traktaĵoj, duoncento da Esperanto-vortaroj kaj lernolibroj en plej diversaj lingvoj, eĉ araba kaj armena, politikaj publikaĵoj kaj tre ŝatataj infanlibroj kiaj Struvelpedro kaj Robinsono Kruso — plenigas la bretojn de la muzeo. Al la lasttempe eldonitaj dokumentoj apartenas publikaĵo de la Viena Ministerio por Eksterlandaj Aferoj temanta pri la sudtirola problemo. Tradukita en Esperanton ĝi estis disdonita al ĉiuj delegitoj de la Unuiĝintaj Nacioj, samtempe kun tradukoj en la aliaj mondlingvoj.

Kun surprizo oni konstatas ke ankaŭ iuj komunistaj politikistoj — precipe Mao Tse-tung

(esperante: Maŭ Zedong) — publicigas en Esperanto paroladojn kiujn ili konsideras gravaj. Sub Stalino, Esperanto estis malpermesita kiel "kosmopolita malbonaĵo". La "senstalinigo" de nove igis la lingvon akceptinda por la komunistoj. Cetere, en tiu punkto Hitler konformiĝis al la Stalina koncepto. Li ankaŭ trovis suspektindaj tiujn internaciajn strebojn de mondhelplingvo por interpopola kompreniĝo. Por la naciistoj krome sufiĉis la fakto, ke la eltrovinto de Esperanto, Dr. L. L. Zamenhof, estis judo por forkondamni Esperanton. La fondinto kaj direktoro de la Viena Muzeo, kortega konsilanto Hugo Steiner, kiu kompiladis ekde 1927 sian kolektaĵon en malegoista idealismo sen pli ol morala subteno de aliaj kaj lokumis ĝin en malnovan ĉevalstalon antaŭ ol li povis transloĝiĝi kun sia posedaĵo al la "Hofburg" kaj trovi oficialan kontakton kun la Nacia Biblioteko de Aŭstrujo, pro la anatemo de Hitler kontraŭ Esperanto devis subiri plurjaran areston en koncentrigaj kampoj.

☆

— La aŭtoro de la artikolo tiam priskribas la interesajn "unikaĵojn" kiuj troviĝas en la Muzeo, poste rakontas en kelkaj linioj la junaĝon de Zamenhof kaj klarigas kiel ĉe li venis la ideo pri mondhelplingvo kaj daŭrigas jene:

Cetere, Zamenhof ankoraŭ ĝisvivis la kreskantan sukceson de sia helplingvo. Dikaj ligaĵoj de gazetoj en la Viena muzeo atestas ke ĝis nun ne malpli ol mil naŭcent Esperanto-gazetoj kaj revuoj publikiĝis en la mondo. Tamen, nur cent sepdek el ili konserviĝis ĝis la hodiaŭa tago kaj la plimulto aperas en malgranda eldonnombro. La idealismo, la revoj, la bataleme fanatika spirito de kelkaj Esperanto-asocioj ne kapablas forgesigi ke **la signifo de tiu ĉi movado kuŝiĝas pli kaj pli en la kulturhistorio.** En la tuta mondo manifestis sin klara malpliigo de la intereso por Esperanto post la prospera epoko kiun la lingvo travivis de ĉirkaŭ 1900 ĝis 1920.

La teknika progreso nome fariĝis sukcesplena konkuranto de Esperanto kaj de ĉiu alia helplingvo. La simultan-tradukado tute forpuŝis la jam tre malnovan ideon de facile lernebla mondlingvo funkcia kiel internacia komprenigilo en interpopolaj kongresoj kaj supernaciaj komitatoj. Peticio adresita en 1954 al la Unuiĝintaj Nacioj kun dek ses milionoj da subskriboj en kiu la U.N. estis urĝe petataj kunhelpi por ke Esperanto estu enkondukota kiel deviga fako en la lernejan programon kaj utiligota kiel kongreslingvo en internaciaj kunsidoj, rikoltis nur la teorian sukceson ke la U.N.E.S.C.O. establis "konsultajn rilatojn" kun la Universala Esperanto Asocio. En la praktiko tamen, la pozicio de la kongreslingvoj angla, franca, hispana kaj rusa estas pli forta ol iam antaŭe kaj la poten-

caj ŝtatoj starantaj malantaŭ tiuj lingvoj eĉ ne intencas stimuli artefaritan lingvon por siaj internaciaj rilatoj. Ne ekzistas ĝis nun indikoj ke realiĝos la espero — per kiuj nutras sin rondoj esperantistaj — nome ke la novaj ŝtatoj sub influo de siaj venĝosentoj kontraŭ la iamaj koloniaj potencoj kaj dum sia serĉado de facile lernebla lingvo, apogos la politike neŭtralan, gramatike rimarkinde simplan Esperanton.

☆

— Post kelkaj klarigaj rimarkoj koncerne la strukturon de Esperanto, ĝian sistemon de vortformado pere da afiksoj kaj citinte frapajn ekzemplojn de ĝia facila lernebleco, la aŭtoro diras:

Alia, tre grava kaŭzo de la malprogreso de la Esperanto-movado estas ĝia manko de monaj rimedoj. En tiu ĉi epoko, en kiu grandaj nacioj, antaŭ ĉiuj Francujo, investas kolosajn sumojn por la disvastigo de siaj kulturo kaj lingvo, disponigas senpage milojn da instruistoj por la junaj popoloj kaj starigas aktivajn kulturinstituciojn en ĉiuj kontinentoj, estas ja memkompreneble ke la Esperanto-movado havas nur malgrandajn ŝancojn en la evoluantaj landoj ĉar ĝia varbado estas limigita al buŝa propaganda, prospektoj, kelkaj sufiĉe maloftaj radio-disaŭdigoj kaj ĉiujaraj universalaj kongresoj.

Neniu povas diri kiom da homoj hodiaŭ sciopovas paroli Esperanton. Oni tamen konsentas ke la Esperantista posteularo estas maldense semita. Se ne baldaŭ influhavaj, internaciaj aŭtoritatoj tamen montras sian intereson por mondhelplingvo agnoskante Esperanton kiel kongreslingvon, tiam ĝia estonteco aspektas sufiĉe trista.

La cirkonstancoj en Aŭstrujo eble estas karakterizaj. La aŭstra Registaro en si estas amike inklinita koncerne Esperanton. Sed la klopodoj de la Ministerio de Edukado, faritaj antaŭ du jaroj, prove enkonduki Esperanton en unuagradajn kaj duagradajn lernejojn fiaskis pro tute negativa reago flanke de la reprezentantoj de la gepatroj. La gvidanto de la tradukinstituto en la Universitato de Vieno, Profesoro D-ro Matejka, antaŭ kelkaj jaroj varme rekomendis la starigon de Esperanto-instrufako ensia instituto. La plano malsukcesis ĉar protestis la profesora kolegio, motivante ke "Esperanto ne plu havas estontecon". Jam en la jaro 1917 fondiĝis en la Teknika Universitato de Vieno lektoreco por Esperanto. Post la morto de ĝia longjara gvidinto, en 1959, Profesoro D-ro Sirk, la posteno ne plu estis reokupita.

Hodiaŭ, en neniuj loko en Aŭstrujo Esperanto estas ankoraŭ instruata en lernejoj. Eĉ la Vienaj popoluniversitatoj, kiuj antaŭmilite okazigis serion da Esperanto-kursoj, fine ĉesigis siajn

plurfoje ripetitajn klopodojn por reinstali Esperanton en la edukprogramon, pro manko de interesiĝantoj. Sole la Viena socialista virina revuo "Die Frau" publikigas nuntempe konsilojn por instigi al lernado de Esperanto. Po unufoje ĉiusemajne la aŭstra radio dissendas dekminutan programon en Esperanto; la pola radiostacio disaŭdigas eĉ ĉiutage en Esperanto; radio Zagreb kaj la dana stacio je regulaj intervaloj.

La Vienaj Esperanto-klubo — devenaj al la intermilita epoko — (ekzistas i.a. fervojista rondo, katolika Esperanto-klubo, kiu ĵus celebris

la 50-an datrevenon de sia fondiĝo en Viena kapelo kun esperantlingva prediko) vegete vivadas trankvilan, intiman klubvivon sen tio ke la publika vivo iam atentigus pri ĝi. Eĉ la fakto ke la Viena urbestro, Franz Jonas, mem estas Esperantisto ne ŝanĝas ion ajn en tiu situacio.

Kaj tiel ŝajnas ke la genia verko de D-ro Zamenhof, verko portita de homarana etoso kaj komencita por kunigi la homojn pere de mondhelplingvo, submergiĝos en la evoluo de nia tempo.

Tiel nin prijuĝas la ekstera mondo, eĉ tiuj kiuj simpatias kun nia celado, kiel certe faras la aŭtorino de la ĉi supra artikolo.

Vere, estas tempo ke ni vekigu!!

La verkintino pravas, skribante, ke "en la tuta mondo manifestis sin klara malpliigo de la intereso por Esperanto post la prospera epoko kiun la lingvo travivis de ĉirkaŭ 1900 ĝis 1920". Sed, ĉu tiam oni ne pli aktive ol nun elportis la "verdan standardon"? Estas prave ke "tre grava kaŭzo de la malprogreso de la Esperantomovado estas ĝia manko de monaj rimedoj" sed ĉu niaj nunaj anoj estas ĉiuj sufiĉe oferemaj kaj ĉu ni aktive alboras ĉiujn fontojn kiuj povus ŝpruci financajn rimedojn en la movadon, eble por poste utiligi ekonomie la enormajn avantaĝojn kiujn la ĝenerala rekoniĝo de unu internacia helplingvo senpage proponas al la internacia mondo?

Estas vere, ke necesas la baldaŭa agnosko de "influhavaj, internaciaj aŭtoritatoj", sed per si mem ili ne faros tion. Konstante ni, avangardistoj de la movado, atentigu niajn aŭtoritatojn pri la lingvo kaj ĝia potenca valoro por la ĉiutaga praktika vivo.

Aliflanke, la aŭtorino tro unuflanke rigardas la rolon de internacia lingvo, preskaŭ ekskluzive en senco de kongresa lingvo. Ne la kongresoj, sed la lernejoj, la komerco, la industrio kaj la scienco estas pli verŝajne la ŝlosilaj pozicioj per kiuj ni sukcesos enkonduki Esperanton.

Sur la kampo de la internacia komerco kaj industrio disvolviĝis dum la pasintaj monatoj tre grava iniciato kiun prenis la subskribinto kaj por kies efektivigo li trovis tujan, efektivan apogon kaj kunhelpon de Sinjoro Bruno Vogelmann en Crailsheim, Germanujo, kaj de Sinjoro Erik Carlén en Hällabrottet, Svedujo. Ambaŭ okupas elstarajn poziciojn en la industrio. La iniciato kondukos baldaŭ al la starigo de fondaĵo sub la nomo "Instituto por la uzo de Esperanto en internaciaj ekonomiaj rilatoj". Pri ĝia funkciado, ĝia agadprogramo kaj ĝiaj celoj ni esperas baldaŭ raportoj pli detale. Sed ĝia ĉefa celo estas grandskale ataki la indiferentecon kaj miskonceptojn kiuj regas ankoraŭ en rondoj ekonomiaj

kaj komercaj rilate la esencajn valorojn, praktikan utilon kaj gradon de disvasteco de Esperanto.

En la 75 jaroj de nia luktado montriĝis ĉiam pli klare, ke ne per individua varbado (kiom ajn necesa ĝi estas) nek per korespondado kun ĵurnaloj (kvankam ankaŭ tio estas sendube utila), nek per iu ajn alia pure "movada" laborado nia lingvo venos en la pensojn kaj sur la langojn de la homaro. Sed per bone informitaj kaj science preparitaj iniciatoj lanĉitaj ĝustamane en tiuj pozicioj (ministerioj, internaciaj organizaĵoj, estraroj de komercaj entreprenoj k.s.) kies influo estas ne sole sur la publikan opinion, sed ankaŭ sur la praktikon — kiuj do posedas, unuvorte, la *potencon* por fari konkretajn decidojn kaj por ilin efektivigi, ni fine sukcese realigos nian celon.

Tiaj iniciatoj apartenas en si mem ne al amasa movado, sed al kelkaj kvalifikitaj individuoj, kun la apogo kaj diversfaka kunlaboro de pli granda nombro da aliaj. Al tiu kategorio apartenas ekzemple niaj klopodoj ĉe UNESKO, niaj intertraktadoj pri Interŝtata Konvencio pri la lernejoj, kaj nun tre baldaŭ nia nova, tre esperiga entrepreno en la sfero de internacia komerco kaj industrio.

Kompreneble, tiuj klopodoj estus plene maleblaj, sen efika kaj amasa organizaĵo. Kvankam la finaj intertraktadoj devas esti en ĉiuj sferoj sur individua aŭ pluropa nivelo, tamen la organizaĵo donas, DEVAS doni la necesajn fortojn financajn, moralajn kaj geografiajn.

NIA FINA CELO NE ESTAS LA LINGVO MEM — ĜI ESTAS NURA ILO — SED NI EKKONU LA FAKTOJN, NI EKAGU POR KE TIU MIRINDA ILO POR INTERPOPOLA KOMPENIĜO FINE ESTU AGNOSKITA KAJ PRAKTIKE VALORIGITA.

E. L. M. Wensing

Vicprezidanto de U.E.A.

Eindhoven, la 12-an de marto 1963

LABORPLANO DE KLERIGA KONVERSACIA KLUBO (STUDENTA ESPERANTO-KLUBO) KOPENHAGO

(Vidu paĝon 61)

I. Ĝenerale

1. Kunordigadi la kluban agadon kun la movadaj kampanjoj. Adapti ĉi tiun laborplanon al la laborplano de CDEL.
2. Atenti, ke en ĉiuj eksteraj rilatoj laŭeble fakulo turnu sin al fakulo.
3. Organizati diversajn sekciojn enkadre de la klubo, ekz. por studentoj, instruistoj, junuloj, infanoj k.a.
4. Doni al ĉiuj agantoj precize difinitajn taskojn; akurate plenumi ĉiujn laborojn.
5. Fari ĉiujare plenan adresaron de ĉiuj membroj por ĉiuj membroj.

II. Informado

6. Atenti al la Principaro de Frostavallen rilate informadon pri la Internacia Lingvo.
7. Starigi lokan gazetaran servon, kiu informu tagajn kaj distriktajn, instruistajn kaj studentajn k.a. gazetojn pri la lokaj eventoj.
8. Same informi la radion kaj la televidon.
9. Prizorgi informajn bultenojn por instruistoj, studentoj k.a. por sendo al lernejoj, studentaj kolegioj k.s.
10. Daŭre informadi kaj kontakti edukajn kaj universitatajn instancojn, organizaĵojn de instruistoj kaj studentoj k.a.
11. Aranĝi taŭgajn ekspoziciojn pri la Internacia Lingvo, ekz. en libro-vendejoj kaj lernejoj.
12. Prizorgi prelegojn kaj demonstraciojn pri la Internacia Lingvo, adaptitajn al la publiko. Atenti al helpiloj al la prelegantoj (filmoj, lumbildoj, sonbendoj, presaĵoj k.a.), al materialo por la publiko, al regula sendado de proponoj pri prelegoj al diversaj organizaĵoj, lernejoj, kluboj ktp., al provlecionoj.
13. Plani de tempo al tempo publikajn aranĝojn laŭ la modelo de la Zamenhof-festo 1959.
14. Serĉi ĝis kiel eble plej alta grado kunlaboron kun ne-esperantistaj organizaĵoj aŭ individuoj, ekz. per komunaj aranĝoj (prelegoj, filmoj, aranĝoj okaze de la Tagoj de la Homaj Rajtoj, de Unuiĝintaj Nacioj k.s.)
15. Taŭge rebati misprezentadojn pri la Internacia Lingvo.
16. Anonci en ĵurnaloj kaj distriktaj gazetoj pri venontaj kursoj k.s.


III. Instruado

17. Regule ĉiujare aranĝi kursojn por komencantoj kaj progresintoj, por studentoj (precipe en la Universitato), instruistoj, plenkreskuloj ĝenerale, infanoj (ĉirilate aktivigi la instruistojn-membrojn de la klubo), kaj por specialaj kategorioj de homoj en laborejoj, unuiĝoj ktp.

18. Atenti, ke kurso(j) eniru la kursprogramon de almenaŭ unu vesperlerneja institucio.
19. Eduki instruantojn kaj instruontojn de la Internacia Lingvo en studrondoj pri la lingvo, literaturo, movado, metodiko k.a.
20. Laŭeble instruigi eksterlandajn Ĉe-instruistojn.
21. Atenti al la instrumaterialoj.
22. Fari taŭgajn aranĝojn por la kursanoj.
23. Prepari ekzamenojn por la kursfinintoj.

IV. Kluba vivo

24. Senescepte kaj senkompromise uzadi nur la Internacian Lingvon por ĉiuj internaj aranĝoj, inkluzive de la estrarkunsidoj.
- 24a. Komenci ĉiujn aranĝojn absolute precize je la indikita horo.
25. Speciale atenti al la novaj membroj kaj helpi al ili.
26. Daŭre okazigi kunvenojn dufoje monate kaj klopodi plibonigadi la programojn (prelegoj, diskutoj, interŝanĝo de prelegoj kun eksterlandaj grupoj utiligante tiucele ankaŭ la Magnetofonan kaj Filman Servojn de UEA, literaturaj vesperoj, programoj konforme al la kunlaborado de UEA kun U.N.E.S.C.O., precipe rilate al la projekto Oriento-Okcidento, aranĝoj okaze de la Tagoj de la Unuiĝintaj Nacioj kaj de la Homaj Rajtoj, starigo de amatora teatra trupeto kaj eventuale de kantĥoro, vivaj gazetoj, lumbildaj prezentadoj akompane al prelegoj, partopreno en la organizo de prelegvojaĝoj, dancvesperoj, amuzaj kaj aliaj distraĵoj, enketvesperoj).
27. Starigi studrondojn per aŭ pri la Internacia Lingvo.
28. Pligrandigi la bibliotekon de SEK kaj abone aŭ interŝanĝe havigi diversajn Esperanto-revuojn. Aboni "Esperanton". Instigi al la membroj utiligi la bibliotekon.
29. Plufunkciigi la Eldonejon KOKO kaj eventuale vastigi ties agadkampon per instrumaterialo.
30. Eventuale prizorgi vendadon de Esperanto-literaturo en profesia(j) librovendejo(j).
31. Kontakti eksterlandajn societojn esperantajn (i.a. por p-to 26). Adopti lokan grupon en Azio aŭ Afriko por certigi ĝian ekzistadon.
32. Partopreni en la internacia studenta kunlaboro.
33. Varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn por UEA.
34. Prizorgi, ke kiel eble multaj estu fakdelegitoj de UEA, precipe por la plej gravaj fakoj de scienco, edukado kaj kulturo.
35. Eldoni kluborganon kun interesa, informa kaj kultura enhavo.
36. Aranĝi, laŭeble, internaciajn kunvenojn.



Esperanto estas plej bona!

Ciolkovskij

Ĉi jare soveta eldonejo "Molodaja gvardija" (Juna gvardio) aperigis en serio "Vivo de eminentaj homoj" (la serio de biografioj, fondita de M. Gorjkij en 1933) libron de M. Arlazorov "Ciolkovskij" (M. Arlazorov, Ciolkovskij, izdatelstvo CK VLKSM, "Molodaja gvardija" Moskvo, 1962).

Inter alio la libro klarigas rilaton de Konstantin Eduardovič Ciolkovskij al ideo de internacia lingvo. Ĉi sube sekvas citaĵo el teksto sur paĝoj 279-280.

"Verŝajne oni povas pleneluzi multe da papero, rakontante pri pensoj de Ciolkovskij dum la lastaj jaroj de lia vivo. Ili vere estas tre multespecaj. De direktebla balono ĝis raketoj, de maŝinoj por eluzo de la suna energio ĝis esploro de maraj profundaĵoj, de meditadoj pri la deveno de la kosmo ĝis komunhomara lingvo. Cetere, en tiu varieco estas ja certa komuneco. Nome, Ciolkovskij pensas pri homoj, pri bono por homoj. Li, staranta ĉe sojlo de la morto, estas plena je vivo en estonteco — je tiu vivo, kiun vivi estas destino de sekvontaj generacioj.

Inter ekspoziciaĵoj de la Ekspozicio de interplanedaj komunikiloj en jaro 1927 estis unu, fizike ne palpebla. Tio estis "Ao" — artefarita kosma lingvo, destinita por la rolo de komuna lingvo en tiu parto de la universo, kien penetros raketaj ŝipoj de teranoj. Rememoroj de M. I. Popov permesas observi rilaton de Ciolkovskij al tiu scivolinda projekto.

("Ao" de Ciolkovskij, pli precize "OA", havas tute nenion komunan kun la projekto de nombra lingvo "Ao", ellaborita de anarkisto Gordin. "Ao" de Ciolkovskij tute ne estas lingvo, nome ĝi estas alfabeto. "Ĉefa celo de ĉi tiu artikolo — doni plej simplan, al ĉiuj popoloj komprene-

blan, kaj mallongan alfabeton..." skribis Ciolkovskij. "Ĉiu homo devas esti penetrita de superaj ideoj, kondukantaj ĉiujn homojn al feliĉo kaj perfekteco. Tiuj estas la ideoj pri unuiĝo kaj frateco de ĉiuj homoj. Sed kia frateco povas esti, se, sekve de l' diverslingveco, ni ne komprenas unu la alian!" Ciolkovskij proponis komunhomaran alfabeton — alfabeton saman por ĉiuj lingvoj. La vortoj "... Ao — artefarita kosma lingvo, destinita por la rolo de komuna lingvo en tiu parto de la universo, kien penetros raketaj ŝipoj de teranoj" estas nur beletra fantaziaĵo de l' aŭtoro de la libro pri Ciolkovskij.)

Necesas rimarki, ke la problemo pri komuna lingvo dum multaj jaroj okupis la cerbon de Ciolkovskij. Ankoraŭ en jaro 1915 en broŝuro "Formado de la Tero kaj de la suna sistemo" li dediĉis al ĝi apartan ĉapitron.

"Kiom grave estas, ke homoj komprenu unu la alian! Laŭ legendo, homoj havis antaŭe komunan lingvon, sed punite perdis la komunan lingvon kaj ekparolis en la diversaj.

Ĉesis komuna konkordo kaj agado, direktita al unu celo..." Tiel skribis Ciolkovskij en 1915. Humana penso pri kunproksimiĝo de la homaro, pri nuligo de lingva diseco ne lasis lin dum multaj jaroj. Kaj ne estas mirinde, ke la scienculo disvolvis siajn pensojn en broŝuro "Komunhomara alfabeto, ortografio kaj lingvo", eldonita en 1927.

La lingvo "Ao" — papilio unutaga. Ĝia eltrovo tute ne elĉerpas provojn krei artefaritan por ĉiuj kompreneblan lingvon. La lingvo Esperanto estis la plej serioza kaj profunda el tiuj provoj. (Ni pardonu indulge al la aŭtoro tiun laikan "-is" V.K.). Inter ĝiaj adeptoj troviĝis ankaŭ Ciolkovskij. "En sia tempo, — skribis li en 1934 al Popov, — mi tre interesiĝis pri Esperanto, kaj mi havas leteron de Doktoro Zamenhof, sed estas malfacile trovi ĝin inter multaj miloj da aliaj leteroj".

"Certe, Esperanto estas la plej bona el ĉiuj artefaritaj lingvoj. Senduba simpleco de la alfabeto, mirinda facileco de la gramatiko, disvasteco de la vortaro — faras ĝian inventinton senmorta".

Ciolkovskij aliĝis al Sovetrespublikara Esperantista Unio. Popov konservis lian membrokarton. Kaj tre facile oni povas kompreni la maljunan scienciston, kiam, donacante al Popov unu el siaj broŝuroj, li skribis sur ĝi: "Esperanto estas plej bona, "Ao" estas sensencaĵo".

La libro entenas fotodokumentojn. Sur la foto, situanta kontraŭ la paĝo 225, oni vidas membrokarton de Sovetrespublikara Esperantista Unio, plenigitan de Ciolkovskij (en rusa lingvo), kaj leteron de Ciolkovskij al M. I. Popov pri la lingvo Esperanto.

Ĉi sube sekvas tradukoj de la dokumentoj.

"Membrokarto de Sovetrespublikara Esperantista Unio".

Sovetrespublikara Esperantista Unio.
(Tutunia Asocio de Amikoj de la Internacia Lingvo).

Membro N-ro

Familinomo Ciolkovskij

Antaŭnomo kaj patronomo Konstantin Eduardoviĉ

Jaro de naskiĝo 1857 **nacieco** ruso

Socia stato persona pensiulo

Kleriĝo speciale instruita

Sindikato de laboruloj de kleriĝo

Partieco senpartia

Loko de la laboro aŭ la ofico konstruanto de direkteblaj balonoj

Oficposteno konsultanto pri direkteblaj balonoj

Kono de Esperanto: studas, legas, skribas, parolas (nebezonatan vorton forstreki)

Maljuna por lerni

Adreso Kaluga, str. de Ciolkovskij, d. 1

Subskribo K. Ciolkovskij

4 novembro 1934

La letero al M. I. Popov pri la lingvo Esperanto:

1934 j. 4 novembro al M. Popov de Ciolkovskij (Kaluga, str. de C-ij, d. 1).

Multestimata M. Ĥ., leteron de vi mi ne ricevis.

Certe, Esperanto estas plej bona el ĉiuj artefaritaj lingvoj. Senduba simpleco de la alfabeto, mirinda facileco de la gramatiko, disvasteco de la vortaro — faras ĝian inventinton senmorta.

Jen estas ankoraŭ unu atesto de tio, ke Esperanto allogas al si ĉion plej bonan kaj progresaman.

V. Kulikov (Omsk, USSR).

ENKONDUKO DE ESPERANTO NUN !

La adresaro kreskas !

Ĉu vi vidis ĝin ? Pli ol 60 paĝojn de la jarlibro II ĝi ampleksas; en ĝi troviĝas multaj ejoj, en kiuj vi povas vin senti hejme, ĉar oni komprenas vin tie; lokoj, kie Esperanto estas uzebla.

Certe multaj personoj ankoraŭ ne sendis kromajn adresojn, ĉar ili kolektas kelkdekojn da li. Streĉe ni atendos.

Por ŝpari laboron oni uzu nur la numerojn por la diversaj eroj de la respondiloj, ekzemple:

1. B.E.L.O., Lumstrato 12, tel. 36 79 (nacilingve)
2. vendas orajn juvelojn, (en Esperanto)
3. f-ino Elinjo Bonkora,
4. ĉefvendistino, tel. interna 23, k.t.p.

Sendu al: D-do J. Tensen, Churchilllaan 100, Amsterdam-10, Nederlando

ALDONU

Britujo

Londono, Buttinger Holdings, Ltd, 3 Dafforne Road, SW, 17, tel. BAL 89 69, ludonas ĉambrojn sen pensio, ges-roj Buttinger, direktoroj.

Francujo

Dunkerque, Naturaliment, Amiral Ronarch 16, dietaj nutraĵoj, f-ino Pessey, posedantino.

Germanujo

Hannover-Herrenhausen, Armin Schorcht, Clausthaler Weg 10, tel. 7 06 89 kaj Höfestrasse 36, tel. 69 44 00, privata instruado por stenotajpist(in)o, Esperanto-sekretari(in)o, ges-roj A. Schorcht kaj filino.

Hungarujo

Szeged, **Ruggyar**, Kussuth Lajos sug. 72, tel. 24-40, vestaĵfabriko, s-ro Julio Dér, elektromuntisto.

Szegedi Kenderfonógyar, Londoni krt. 3, tel. 24-10, kanabplekta fabriko, s-ro Francisko Koszó, teknikisto.

Szegedi Ecsetgyár, Kossuth L. sug. 109, tel. 12-80, penikfabriko, s-ino Viola Dettre, librotenistino.

Szegedi Nyomda Vallalat, Kárász u. 9., tel. 34-38, presejo, s-ino Margareto Németh, presistino.

Nederlando

Dordrecht, Meterfabriek, Lijnbaan 12, tel. 31 41, metalvaroj, f-ino M. C. J. van der Graaf, stenotajpistino-sekretariino.

Rotterdam, Tajlorejo, Prins Hendrikkade 144, podetale, laŭ mezuro, s-ro L. J. R. Berlijn, estro.

Polujo

Warszawa, Ŝtata eldonejo "Iskry", Smolna 9/11. Tel. 6 47 47, Walerian Włodarczyk, redaktoro.

Svisujo

Hägendorf (SO), Arnold Kamber, Oele 444, tel. 062-6 91 13 (aŭtomato), entrepreno de domkonstruado, s-ro Alfred Egg, ĝen. oficisto.

Ŝanĝoj

p. 146 16 a linio de malsupre: anstataŭ: konstruentrepreno: importas nutraĵojn.

p. 150 linio 3 de supre: anstataŭ: kankuladmaŝina: kalkuladmaŝina.

linioj 14 kaj 15 devas esti anstataŭitaj de: 67.33.13, fabriko de **risortoj** por aŭtomobiloj, bicikloj, korsetoj, instrumentoj, maŝinoj (ĉiuspecaj), k.t.p. s-ro L. F. Robinson, direktoro.

p. 151 estu forstrekitaj: malsupre: la 3 linioj pri Wotton. p. 171 linio 9 de supre: anstataŭ rizmulejo: rizmulejo kaj eksporto.

p. 194 linioj 3 kaj 4 estu forstrekitaj.

Historio pri knabo, kiu famiĝis



Eŭgeno Aisberg

La pariza revuo *Toute l'électronique* parolas en ĉefartikolo de sia pompa 270-a numero, aperinta en novembro 1962, pri la neceso faciligi tutmondan cirkuladon de ideoj per forigo de lingvaj baroj. La revuo rekomendas por tiu celo, ke registaroj de grandaj landoj decidiĝu enkonduki samtempe devigan instruadon de Esperanto. Ĝi subtenas sian rekomendon per trafikaj argumentoj, kiuj pruvas ĝian kompletan informitecon pri la internacilingva problemo.

Ni ne dubas, ke tiu alvoko, vaste legita en fakaj rondoj, vekis atenton kaj influos la leĝintojn minimume en tiu direkto, ke ili serioze konsideros la ideon, subtenatan de fama teknikisto, direktoro de tiu revuo E. Aisberg. Estas li, kiu subskribis la ĉefartikolon.

Tiun nomon ni esperantistoj bone konas. Sinjoro Eŭgeno Aisberg estas aŭtoro de verko, kiu per helpo de Esperanto marŝis tra la vasta mondo en mezuro ĝis tiam nekonita kaj ĝis hodiaŭ ne superita. Lia originale en Esperanto verkita libro: *"Fine mi komprenas la radion!"* enkondukis laŭ maniero unika en sia speco, paŝon post paŝo, bonhumore en la seriozan radio-sciencan kaj helpis ĝin popularigi en konsiderinda parto de la terglobo.

Ĝian aperon salutis la legantoj kaj la kompetentaj inter ili tradukis ĝin el Esperanto en sian lingvon kaj trovis eldoniston, kiu zorgis pri ĝia disvastigo en sia lando. Sub la titolo: *"Babiladoj pri radio"* ĝi komencis aperadi en 1926 en la tiama Internacia Radio-Revuo kaj preskaŭ samtempe ni vidis ĝin en ĉeĥa lingvo, publikigita en la revuo *Radiojournal* de Praha. Kiam tiu ĉeĥa teksto aperis en 1927 libroforme, ni legis en la antaŭ-parolo, ke ekzistas jam tri pliaj tradukoj: la franca, la bulgara kaj la en Brazilo aperinta portugala. Kaj kiam ni fine — en 1934 ĉe Literatura Mondo — ĝisatendis eldonon de kompleta Esperanto-teksto en libro, ni trovis tie noton pri ĝia jama apero en 13

lingvoj. Tiu cifero estis tiam konstatita, sed pli poste ĝi montriĝis nekompleta. Ofte, ĝis la lasta tempo, sin anoncas subite tradukoj novaj, antaŭe nekonitaj. Oni ilin eldonis sen scio kaj sen permeso de la aŭtoro. Nur danke al artikolo en *"El Popola Ĉinio"* eksciis s-ro Aisberg ekzemple la certe interesan fakton, ke en Ŝanhaj aperis libro kun la belsona titolo: *"U-Ŝjan-djan ĝiang-hua."* Por ne meti niajn legantojn en eventualan embarason, ni klarigas, ke estas la Aisberga radiolibro en ĉina traduko de Jü Dau-jüan. De tiu tempo la aŭtoro la libron vane serĉas en librovendejoj de la vasta Ĉinujo.

En 1932 dum Universala Kongreso en Parizo mi renkontiĝis kun inĝeniero Aisberg la unuan fojon. Ĝis tiam ni interŝanĝis lavangon da leteroj. Surbaze de tiu korespondaĵo kaj sub impreso de lia libro mi kreis al mi bildon de la aŭtoro, kun kiu min jam ligis firma amikeco: serioza fortikulo de pli ol meza aĝo, tipa franca barbulo, simila al mia tiama alia franca amiko doktoro Domec. Tamen kia surprizo min atendis, kia mirinda interŝanĝo de roloj inter la du kunvenintoj! Nur barbo ĉe mi mankis, sed ĉiukaze estis mi la gravmiena diketa maljunulo, dum la svelta junuleto, kiu ne ofte bezonis ĝeni barbiron, estis la atendata amiko. Estis vere Aisberg, li portis ja sub sia brako flavan kajeron de la Internacia Radio-Revuo, la interkonsentitan rekonilon. Montriĝis, ke li estis knabo apenaŭ 20-jara, kiam li verkis la *"Babiladojn"*, en aĝo de 28 jaroj li havis sian libron jam en 13 lingvoj kaj li ĉefredaktoris en du fakaj revuoj.

Hodiaŭ estras inĝeniero Eŭgeno Aisberg renomitan teknikan eldonejon en Parizo, estas aŭtoro de multaj fakaj libroj, direktoro de kvar grandaj revuoj pri radio kaj televido, prezidanto de la Internacia Unuiĝo de Radioteknika kaj Elektronika Preso. Kvankam li apartenas inter la unuajn tutmondajn fakulojn de tiu ĉi

teknika branĉo oni ne povas diri, ke nia Aisberg, ĉiam plena de vervo kaj de ideoj, atingis pinton de sia kariero.

La verkon *"Fine mi komprenas la radion!"* Aisberg multe plivastigis kaj samformajn librojn li verkis pri televido kaj pri transistoro. Bedaŭrinde li ne havis plu eblecon eldoni tiujn tri librojn en Esperanto, kvankam li estas daŭre fidela esperantisto, majstranta perfekte nian lingvon. Ili estis publikigitaj denove en multaj lingvoj kaj eldonoj, la franca radiolibro ekzemple aperis en 26 eldonoj, sume en pli ol 330.000 ekzempleroj, kio estas absoluta rekordo en teknika literaturo. Verkoj de Aisberg estis publikigitaj laŭ gisnuna konstato en la sekvaj 27 lingvoj: Esperanto, angla, bulgara, ĉeĥa, ĉina, estona, finna, franca, germana, greka, hebrea, hispana, hungara, itala, kroata, latva, nederlanda, norvega, pola, portugala, rumana, rusa, serba, slovaka, slovena, sveda, vjetnama.

Plej proksima estas nun novapero de la libroj pri radio kaj pri televido en la bulgara ŝtata

teknika eldonejo kaj de la radio-libro en la dua hebrea eldono.

Jen ĉapitro pri "Knabo, kiu famiĝis," taŭga por envicigo en tiutitolan konatan libron de la usona verkistino S. K. Bolton. La rakonto estas interesa speciale por ni, montrante, kian gravan rolon ludis Esperanto en la vojo de samideano Aisberg al sukceso.

☆

Bonaj esperantistoj, majstrantaj krome iun el la ĉeflingvoj de la mondo, laŭeble fakuloj pri radio kaj televido, havas ankaŭ nun okazon kunlabori kun S-ro Aisberg en laboro ne plej facila, sed al kapabluloj liveranta multan ĝuon kaj fine agrablan enspezon. Komprenu, ke en la 27 lingvoj ne aperis ĉiuj menciitaj tri libroj.

Al seriozaj samideanoj, kiuj antaŭe mem fidiinde informiĝos pri neekzisto de iu el tiuj libroj en ilia lando kaj kiuj estas pretaj al tiu interesa laboro (traduko kaj trovo de bona eldonisto), donos pliajn informojn O. Ginz, Shikun Agash 30/8, Kirjat Jam Bet, Israelo.

Universala Esperanto-Asocio kandidato por la Nobel-Pacpremio 1963

Oslo, marto 1963.

Pluraj ministroj, deputitoj de naciaj parlamentoj, konataj filozofoj, historiistoj, profesoroj de Internacia Juro aŭ Politikaj Sciencoj kaj aliaj elstaraj personoj el 13 landoj faris proponon al la Nobel-Komitato en Oslo, ke Universala Esperanto-Asocio ricevu la Nobel-Premion por la Paco por la jaro 1963.

Inter la proponintoj troviĝas la nomoj de S-ro Vigo Kampmann, Ĉefministro de Danlando; S-ro Guy Mollet, Deputito kaj estinta Ĉef-ministro de Francujo; S-ro Thanopoulos Dimitrios, estinta Ministro kaj nun unua Vicprezidanto de la Helena Parlamento; Adv. Virginio Bertinelli, Ministro de Laboro en la Itala Registaro; Prof. D-ro Tadeusz Kotarbinski, estinta Prezidanto de la Pola Akademio de Sciencoj; Prof. Oscar Secco Ellauri, estinta Ministro de Publika Instruado kaj Ministro de Eksterlandaj Aferoj en la Urugvaja Registaro; S-ro Aase Bjerkholt, Membro de la Norvega Registaro; S-ro Franz Jonas, Deputito kaj Urbestro de Wien; pluraj membroj de la Franca Senato; 11 deputitoj kaj senatanoj de Italujo; 14 membroj de la Nederlanda Parlamento; deputitoj de la parlamentoj de Cejlono, Madagaskaro kaj Urugvajo, profesoroj kaj filozofoj el Hispanujo, Italujo, Japanujo, Pollando kaj Urugvajo.

La proponoj akcentas la kreskantan disvastiĝon de la Internacia Lingvo en lastaj jaroj ĉie tra la mondo; la gravecon de la abunda traduka literaturo en la Internacia Lingvo kaj el la Internacia Lingvo en la naciajn idiomojn, kio multe helpis al reciproka aprezado de la kulturaj valoroj de ĉiuj popoloj; la kunligan rolon de la multnombraj gazetoj, sciencaj kaj literaturaj revuoj, kiuj aperas en Esperanto; la radio-elsendojn en la Internacia Lingvo; diversajn artajn manifestaciojn en Esperanto aŭ pere de ĝi; la sciencajn literaturon kaj la sciencajn rilatojn trans la lingvaj baroj. En la proponoj estas donitaj ankaŭ multaj informoj pri la agado de la Universala Esperanto-Asocio, speciale pri tiu agado, kiu rekte koncernas la mondan pacon.

Novaj Libroj

Cion ricevitan ni mencias. Verkojn por recenzo ni elektas inter la duope ricevitaĵ. Neneŭtralajn eldonaĵojn ni senpartie resumas; *) ricevebla ĉe U.E.A.

Sango, sango kaj sango

RAKONTOJ DE OOGAI kun enkonduko de Ivo Lapenna. Tradukis el japana lingvo Teruo Mikami, Miyamoto M., Kikunobu Matuba, Nozima Yasutarō. Lingve kontrolis D. B. Gregor. Eldonis Japana Esperanto-Instituto, Tokio, 1962. Serio Oriento-Okcidento n-ro 2. 116 p. 21 × 14,5 cm. 2 bildoj. Tolbindita. Prezo 10,25 gld.*

Je la 29-a de julio 1957 UNESKO turnis sin al ĉiuj organizaĵoj por kontribui al la realigo de la t.n. Granda Projekto pri Reciproka Aprezado de la Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj valoroj.

En la kadro de tiu ĉi movado aperis la nomita libro en vere luksa formo, sur papero, kiu estas inda por reprezenti la bonfaman japanan paperindustrion.

Mori Rintarō (1862-1922), plumnome Mori Oogai estis kuracisto, kiu studis parte en Tokio, parte (dum 1884-1889) en diversaj germanaj universitatoj, i.a. en Berlin, sub la gvidado de Robert Koch. Poste, kiel kuracisto, li servis en la japana armeo kaj partoprenis la sieĝon de Port-Artur (1904) apud generalo Nogi, kun kiu li estis intima. Do, li edukiĝis komence en feŭda atmosfero, poste en okcidentaj medioj.

KVAR NOVELOJ

Tiun ĉi duoblan influon respegulas lia tuta verkaro. Krom originale japaneskaj verkoj li tradukis al japana lingvo Andersen, Ibsen, Wilde, Flaubert, Shakespeare, ktp. Liaj nun aperintaj kvar noveloj estas elektitaj por prezenti ambaŭ liajn flankojn.

El liaj germanaj jaroj devenas la ĉarma rakonto "*La mesaĝo komisiita*": japana kapitano Kobayasi en germanaj aristokrataj rondoj senintence, sed feliĉe sukcesas savi grafinon Ida el la kontraŭvola edziniĝo, altrudata de ŝiaj gepatroj. En la rakonto estas plej valora la vigla, plastika priskribo de la

tiam germana altvivo, precipe la kortega balo en Dresden.

"*La Takase-barko*" temas pri la nigrega profundo de la homa mizero. Kisuke, la sortbatita junulo estas kondamnita por eterna ekzilo al fora insulo kaj li, anstataŭ malĝoji, sentas nur feliĉon, ĉar de post nun li estas savita de la senĉesa batalo kun la malsato kaj malcerta morgaŭo. Haneda, la eskortanta suboficisto, kiun premas materiaj zorgoj, devas rekoni, kiom relativa estas la koncepto de feliĉo. Jen, li estas pli malfeliĉa ol la kondamnitulo.

"*Sansyō-dayū*" rakontas antikvan japanan folkloraĵon: du gefratojn rabas la sklavkomercistoj kaj vendas. La knabino oferdonas sian vivon por ebligi la fuĝon de sia frato. Post aventurplena kaŝvagado li renkontas altrangan nobelulon, kiu pri lia Buddha-talismano malkovras, ke la knabo estas ido de aristokrata familio. Tiel li baldaŭ fariĝas provincestro. La historio iome memorigas pri la romano de Victor Hugo "*L'Homme qui rit*" (La ridanta homo) en pli mistera, folkloro formo.

"*La familianoj de Abe*" rakontas historiajn faktojn el la samuraja vivo de la deksepa jarcento. Tadatōsi, la potenca daimio grave malsaniĝas kaj multaj liaj vasalaj samurajoj petegas de li permesi "mortakompani" lin, t.e. harakiri post la morto de la mastro. Tadatōsi permesas al dekok siaj samurajoj la mortakompanion, kiuj post lia morto unu post la alia harakiras en diversaj temploj.

Al Yatiemon Abe ne estas permesita la harakiro. Li restas viva kaj pro tio li suferas malestimon en sia medio. Fine li kunvokas siajn filojn kaj antaŭ iliaj okuloj tranĉas la ventron, kvankam la senpermesa harakiro estas konsiderata nur "hunda morto". La filoj ĝojas pro la tiel restarigita familia reputacio, sed la intimuloj

de la nova daimio intrigas kontraŭ ili. Pro la nova honto la heredanta filo, Gonbee dum la datrevena festa ceremonio de la morto de Tadatōsi publike detranĉas, sian hartufon kaj oferas ĝin.

Pro tiu ĉi "ofendo" Li tuj estas arestita kaj poste ekzekutita. Liaj fratoj kolektiĝas en la domo de Gonbee. Tie atakas ilin la soldatoj de la daimio, sed antaŭe la fratoj mortigas siajn edzinojn, gepatrojn, gefilojn kaj poste, dum la atako, post heroa mortigo de multaj atakantoj, ĉiuj estas ekstermitaj.

MORTO ESTAS CELO

Por okcidentanoj eble ĉio ĉi ŝajnas sensenca sangverŝado, ĉar ni buĉadis-as-os nin pro tute alitipaj sensencaĵoj, kiel ekz. la komunio, aŭ nacieco.

Sed tamen ekzistas diferenco, ĉar en tiu ĉi rakonto la homoj mortigas kaj sinmortigas por la mortigo mem. La morto estas celo, por dokumenti, ke bravulo ne domagas la vivon. Du amikoj skermas nur por ekscii, kiu estas pli lerta lancisto. La vundiĝinto tuj harakiras pro la honto. Kazuma, unu el la atakantoj iras al la batalo kun la firma decido, morti. La filoj de Yatiemon "senpeziĝe" rigardas, kiel ilia patro tranĉas la ventron kaj gorgon.

Ĉiu harakiro estas detale priskribita: en kiu templo, kiam kaj kiel okazis kaj kiu dehakis la kapon post la ventrotranĉo.

Sango, sango kaj sango, kiu plej ofte eĉ pretekstan motivon ne havas. La pinto de la "behinismo": ĉiu suferigo okazas nur por dokumenti, ke la herooj havas kontraŭnaturajn instinktojn.

Terura inkubsonĝo, kiu post traŭma premsidas la koron kaj semajnlonge maldormigas la leginton. Ĉu tiu ĉi moralo reprezentus la japanan karakteron? Espereble ĝi tamen entenas multe da poezia fantazio, ĉar finfine tamen restis vivantaj japanoj. Sed la morala vidpunkto de la novelo vere ne estas simpatia.

Des pli interesa kaj valora estas por ne-japanoj la priskribo de la tiatempaj kutimoj kaj moroj. La stilo iome similas al tiu de la *Ilias*: pri ĉiu heroo estas detale priskribita lia genealogio, liaj bataloj en flankepizodoj, kiam li vasaliĝis al la daimio, pro kiaj batalmeritoj li ricevis la feŭdan rizan salajron kaj kiom multan. Kiom longa estis lia glavo, kiel hardita, ornamita, kaj per kiom da najloj estis la prenilo fiksita al la klingo, ktp.

La kvar tradukintoj faris brilan laboron. La traduko estas vera perlo de nia lingvo.

Sándor Szathmári (Budapest)

FINIĜANTA SOMERO

EMBA: EKZILO KAJ AZILO. Poemkolekto. Antaŭparolo de Norberto BARTELMES. Stafeto, Beletraj kajeroj No. 15. La Laguna 1962. 164p. Prezo: 5,70 gld.*

Pli ol nura poemkolekto, *Ekzilo kaj Azilo* estas tuta vivhistorio. La hungara movad-aktivulo Imre Baranyai, pli konata literature sub la pseŭdonimo Emba, vivinta en duonmizero kaj mortinta pro ftizo antaŭ unu jaro, liveras al ni veran testamenton, vivsumon.

Emba certe ne povas esti konsiderata kiel unu el niaj grandaj poetoj. Li restas en la saĝaj limoj de la "polurita romantismo", sen originala verstekniko kaj — ni diru ĝin sen ĉirkaŭfrazoj — sen eksterordinara poezia genio. Li estas homo, kiu verse malkovras sian animon. Pluso kaj minuso de tia sinteno estas tuj videblaj: sincera liriko, versoj facile alireblaj (freŝa aero post la kapdoloroj ofte kaŭzataj de niaj metafizikuloj), sed ankaŭ tro da sent-elverŝo, tro da parolemo, tro da retoriko kaj didaktiko, kiuj ofte fuŝas veran talenton.

Sed tie trudiĝas du rimarkoj: unue, Emba ne limigas la lirikon al elmonro de la propra animo

kaj al amromantikaj temoj. Due, oni povas konstati progreson de la poezia esprimo en la lastaj poemoj. Tiuj du elementoj igas la libron leginda.

Diverseco de la temoj: en la unua parto ("Ekzilo") regas la naturo, la kamparo, la junaĝaj amoj, la dolĉa lulado de la rememoro, sed ankaŭ la sufero kaj ribelo de la laborantaj klasoj, la kredo je hela estonto, la esperantista batalo: tiuj diversaj facetoj de la personeco de Emba forgesigas la ofte tedajn ripetojn pri kordoloro-fojnodoro, sunbrilo-birdotrililo kaj similaj gurmaĵoj de primitiva romantismo. Oni legu "La Ĝardeno de l'patrino", "Demando", "Eterna Lulkanto", bonegajn versaĵojn de tiu periodo. En la dua parto, Majo lasas lokon al finiĝanta somero: la amaj temoj fariĝas pli maturaj, ankaŭ pli amaraj, ĉar sentimentalismo cedas lokon al erotikismo, la politikaj sopiroj, kiuj ŝajne realiĝis post la dua mondmilito, alportante liberiĝon al laboristoj kaj kamparanoj ("1945", "Demokratio vivu", "En sonĝo"...), iom post iom ankaŭ dronas en pesimismo pro la posta evoluo de la nova reĝimo. Sed tiu pesimismo, akriĝita ankaŭ de la

malsano, kondukas la poeton al antikva epikurismo:

"Malnovaj saĝoj - ilin jam l'antikvuloj sentis,

Pli novan kaj pli saĝan ĝis nun ni ne inventis."

kie trovas lokon kaj diboĉemo kaj tamena espero kaj sopiro al eterna ripozo. Tie Emba kantas sian cigno-kanton, tie li atingas sian propran klasikismon, tie troviĝas kelkaj el liaj aŭtentikaj ĉefverkoj. Mi citas senorde: Margareta, En mia naskiĝvilaĝo, La Penso, En soleca horo, Koni vin, Libero, Drinkokanto...

La versaĵoj dediĉitaj al nia movado ofte sonas naive ("La bona oĉjo Bion"), sed sincera estas la penso, ofte trafa la esprimo:

"Popol' ni estas, ne movado nura".

Ili atestas pri senkompromisa fideleco al nia idealo, kiu postvivis siajn famajn malamikojn: Hitler kaj Stalin (vidu la poemojn: "Rebrilos la stel'" kaj "Idolfalo"), fideleco al "standardo nia, de sangverŝoj pura".

Emba: aminda animo, konenda verko.

Michel DUC GONINAZ
(Bezons)

KURAĜA VETO

MONDA KULTURO - Internacia Revuo pri Literaturo, Filmo, Teatro, kvaronjare eldonata de U.E.A., Redaktoro William AULD, Jarabono: 15 ned. gld.*

Periode prezentiĝas al la kulturavida parto de la Esperantistoj la demando pri pure literatura-kultura revuo. Dum 20 jaroj, kun ia intermito, bonege respondis al tiu demando la apero de "Literatura Mondo" kun ĝiaj suplementoj "Lingvo-Libro", "Bibliografia Gazeto" k.s. Ĝis nun oni ĝin ne superis, nek eĉ, mi kredas, egalas.

Depost kelkaj jaroj, du literaturaj gazetoj, unu en la nordo, la alia en la sudo, la bone konataj "Norda Prismo" kaj "Nica literatura revuo" provis montriĝi ne tro malindaj idoj de la modelo. Ili nun pli-malpli agonias, se ne jam mortis, preskaŭ ekskluzive pro financaj kaŭzoj: nesufiĉa subteno de la Esperantistoj, krome, multaj amikoj el la nepagipovaj landoj ne povas aboni.

Kaj nun kuraĝe antaŭeniras sur la scenejon la nova revuo "Monda Kulturo", kies redaktoron William AULD ja ne necesas prezenti. Ĝia apero respondas al vera bezono, sed, ŝajne pli feliĉa ol la nun malaperantaj fratetoj, ĝi povas apogi sin, almenaŭ el la propaganda vid-

punkto, sur la fortikan bazon de U.E.A. kun ĝia monda reto.

Kion celas W. AULD? Li tion klare indikas en la 1-a numero: prezenti nur originalaĵojn, altnivelajn. Unuavide, en tiu ĉi ambicia perspektivo kuŝas la malfacileco: oni rajtas demandi sin, ĉu estas prava la aserto de la redaktoro, ke la "originala kulturo de la esperantistoj estas jam sufiĉa por pravigi la ekziston" de la naskiĝanta revuo. Mia propra opinio, kiel juĝanto, de pli ol 10 jaroj, de la proza parto de la Belarta Konkurso, estas, ke la postulato ankoraŭ tro fruas, ĉar en la B.K. oni vidas preskaŭ nur la samajn nomojn ĉiujare.

Krome, eĉ se la kvalito estas bona, ĉu sufiĉos la nombro de la taŭgaj originalaj verkistoj? Neeviteble oni allasas sin al komparo kun "Literatura Mondo". Sur la kovrilpaĝo de la 2-a numero de 1938 aperas la nomoj de kunlaborantoj, kaj mi tie kalkulas pli ol 80. Oni ankaŭ ne forgesu, ke tiuj pli ol 80 kunlaborantoj provizis la revuon plej ofte per valoraj tradukaĵoj, proksimume 3/4 por la prozo, eble iom malpli por la poezio. Resume, malgraŭ impona nombro da literaturemuloj, la kvanto de originalaĵoj estis ne multa. Nun temas, de malpli granda nombro da

verkistoj (oni pruvu la malon se eble!) ricevi nur valorajn originalaĵojn. Ni tamen akceptu la kuraĝan veton, kun la espero, ke ĝi malpravigos min.

Kiel prezentiĝas la du unuaj numeroj? Statistike: 13% da poezio; en la prozo, plej multe da noveloj aŭ similaj, du drametoj, kelkaj studoj kaj kritiko, unu recenza artikolo: sufiĉa diverseco. Analizi ilin unuopaj ne eblas: mi diru, ke la intereso estas ĝenerale bona, ĉe kelkaj pecoj ja iom malpli ol meza. Mia impresoj estas, ke la redaktoro ankoraŭ ne kuraĝas rifuzi kelkajn kontribuaĵojn por pli bonaj pecoj... aŭ ĉu pro manko de ĉi lastaj? La tuto, kiel diris unu mia pariza amiko, efikas ne sufiĉe altire, iom "grize"; mankas, tie-tie, iom da pipro kaj salo, verŝajne ĉar W. AULD tro "serioze" konsideras sian laboron, tute same kiel la lernanto de biciklirado ankoraŭ tro streĉas siajn manartikojn, anstataŭ suple teni ilin.

Mi deziras, kaj esperas, ke W. AULD tenos sur la revua kampo la bonegan lokon, kiun J. Régulo-Pérez okupas sur la eldona, por la bono de tiu nia movado kaj la ĝuo de la literaturamantoj.

Roger Bernard (Bois-Colombes)

LA HOMO RESTAS

PROVO ALFRONTI LA VIVON de Ivan St. GEORGIEV, eld. Stafeto, La Laguna, 1962. Beletraj Kajeroj n-ro 16. 112 p. Prezo 3,80 gld.*

En la antaŭparolo al tiu ĉi libro W. Auld nomas ĝian aŭtoron minora poeto. Tiun konkludon li faras verŝajne tial, ĉar Georgiev ne proklamas ian personan filozofion, nek esprimas sian sintenon al la grandaj problemoj de la nuna tempo. Tamen — estas diversaj "Provoj alfronti la Vivon" kaj ĝiajn grandajn problemegojn. Antaŭ ĉio oni povas polemiki kun la vivo kaj kun la homa historio. Kaj ĝustion, ekzemple, faras William Auld en *La Infana Raso*. En *La Konflikto de la Epokoj* Edwin de Kock, kontraŭe, provas ekkompreni la historion. Julio Baghy, en *Sonĝe sub Pomarbo*, eĉ klopodas eskapi kaj superruzi tiun danteskan homan farson. Kaj Raymond Schwartz, simple, mokas ĝin. Ĉiu el la nomitaj aŭtoroj do okupas difinitan pozicion.

En la poezio ni devos lerni ŝati kaj gustumi ĉiujn meridianojn kaj ĉiujn paralelojn. Poste facile ni malkovros, ke Ivan St. Georgiev ne estas "minora" poeto, sed nur iom alia. Ĉio enmonde ŝanĝiĝas. La hieraŭaj scioj iĝas la hodiaŭaj eraroj. Kaj la hieraŭaj saĝoj iĝas la hodiaŭaj herezaĵoj. Nur la homo restas. Kaj kelkaj liaj primitivaj inklinoj kaj sopiroj.

....mi vidas,
ke naskiĝas
en vi la vento
de l' voluptosento...
Nu,
ni kuŝu
sub la firmamento...!

Karolo Piĉ (Litomyšl).

EN NOVAN FABELREGNON

ĈEĤAJ FABELOJ de Valda Vinař, kun bildoj de Josef Lada: Eld. Amokademio, Japanujo, 1962. 74 p., 19 × 13,2 cm. Dua volumo en la serio "Fabelaro por tutmondaj infanoj". Prezo: 2,00 gld.*

Sufiĉas ekvidi la kovrilon kaj vi rekonas la "Japanaj Fabeloj". Sed vi eraras. Ĉi tiu estas "Ĉeĥaj Fabeloj". Presita en Japanujo kvaŭzaŭ por pruvi la unuiĝadon de Oriento kaj Okcidento, ĝi enhavas klarajn kaj iom grandajn literojn sur glatpapero kaj belajn kolorbildojn por allogi la infanan menson.

Fabeloj estas fabeloj kaj samaj ĉie, ne gravas al kies lando ili apartenas. Legu kaj komparu kun viaj propraj naciaj. La ses fabeloj

ĉi tie estas bonaj kaj instruemaj al la infanoj kvankam dum la infaneco neniu pensas pri la instruemo sed nur sentoj kaj emocioj per kiuj ĉi tiuj rakontoj estas plenigitaj. Valda Vinař, kies nomo estas literita laŭ tri manieroj en la libro, rakontas ĉerpante el la verkoj de du famaj geverkistoj kiuj vivis dum la pasinta jarcento. Tamen ĉi tiu verko ne estas traduko, kaj la peno de la verkisto flugigi la gejunulojn en novan Fabelregnon kaj reen estas komplimentinda. La lingva stilo estas bona, kaj la longaj vortoj estas facile malkunigeblaj en ordinarajn radikojn. Pro tio la infanoj povas ĝin legi sen ĝenado de ofta sinturno en grandan vortaron.

C. H. Dharmatilake (Kolombo)

LA NUNA SITUACIO KAJ NIAJ TASKOJ, de MAŬ Zedong. El la ĉina. Eld. Ĉina Esperanto-Ligo, Pekino, 1962. 43 p. 18,5 × 13,0 cm. Prezo: 0,30 gld. (1,2 st) broŝurita.*

Plejparte tiu ĉi broŝuro konsistas el parolado de Maŭ farita ĉe kunveno de la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio en 1947, unu jaron post la ekmilito inter la Partio kaj Kuomintango.

Maŭ pritraktis la historion kaj politikon de tiu milito, kaj klarigis la militajn kaj postfrontajn ekonomiajn strategiojn de la Partio, precipe rilate agraran reformon kaj malgrandan kapitalon.

Resumis: V. Sadler

La Malakordoj inter K-do Togliatti kaj ni, el Renmin Ribao, eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 44 p. 18 × 13 cm. Prezo: 0,50 gld. (2 st.)

Tiu ĉi ĉefartikolo el la ĵurnalo "Renmin Ribao" diskutas la geografian kaj historian universalecon de marksismo-leninismo en ligo kun la apero de nukleaj armiloj. Ĝi priskribas la sintenon de la Ĉina Komunista Partio al la kontraŭaj vidpunktoj pri milito kaj paco, paca kunekzisto, paca revolucio kaj la jugoslavia politika evoluo, elmetitaj ĉe la Dekaj Kongreso de la Itala Komunista Partio.

Resumis: V. Sadler

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Elingita glavo, de "Verdiro", eld. Stafeto, La Laguna, 1962. 147 p. 19 × 12 cm. Beletraj kajeroj n-ro 14: politikaj k.a. artikoloj.

La kun-princlando Andoro, lasta feŭda ŝtato, de Jean BACQUER,

eld. Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, 1962. Trad. André RIBOT. 73 p. 18 × 13 cm., ilustrita. Prezo: 5,75 gld. (23 st.)

Lingvaj Respondoj de Zamenhof, 6-a eldono, aranĝo kaj notoj de Gaston WARINGHIEN. Eld. Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, 1962. 134 p. 20 × 13 cm. Prezo bind. 7,50 gld. (30 st.), broŝ. 5,75 gld. (23 st.)

Cours de Langue Internationale de A. RIBOT, eld. Esperantaj Francaj Eldonoj, Marmande, 1962. Kurso por franclingvanoj en 6 diskoj kaj 8 kajeroj 19 × 20 cm. Prezo 61,25 gld. (245 st.)

Kristalaj proprecoj de la 5 β D glukosido de la ± narigenino, de I. M. de SAENZ kaj A. AMIT, eld. Fakultato de Kemio, Montevideo; 5 p. 30 × 21 cm., multobligita, ilustrita.

Tagore kaj Whitman, nova studo pri iliaj filozofioj, de B. C. Chaudhuri, eld. Internacia Esperanto-Instituto, Den Haag, 1961. 12 p. 15 × 10 cm.

The Nixon Esperanto Vocabulary, eld. S.B.E.T., Londono 1962. 178 p. 14 × 8 cm., prezo 1,50 gld. (6 st.). Vortareto angla-esperanta kaj esperanta-angla.

La Interpretisto, de Jean HUMBERT, eld. Editions du Panorama, Bienne, 1962. 200 p. 15,5 × 10,5 cm., ofsetita. 500 frazoj kun paralelaj tradukoj angla, araba, esperanta, franca, germana, greka, hispana, itala kaj rusa. Prezo: 14 steloj.

Aerpoŝtaj markoj, kun teksto angla, franca kaj Esperanta, eld. Esperanto-Press, Oakville, Ont., Kanado; prezo: po 15 steloj por 250 ekz.

Suomi Esperanto Suomi de Joel VILKKI, eld. Söderström, Osakeyhtiö, 1963. 204 p., 12 × 10 cm. Vortaro finna-esperanta kaj esperanta-finna. Prezo: 20 steloj.

Proletoj de ĉiuj landoj unuiĝu por oponi nian komunan malamikon, el Renmin Ribao, eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 25 p. 18 × 13 cm. Prezo: 0,35 gld.

Leninismo kaj Moderna Reviziismo, ĉefartikolo de la revuo "Ruĝa Flago", eld. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1963. 18 p. 18 × 13 cm. Prezo: 0,25 gld.

La Papalagoj, paroladoj de oceania tribestro, publikigitaj de Erich SCHEURMANN, trad. el la nederlanda F. FAULHABER. Eld. SAT kaj FLE, Parizo-Amsterdam, 1963. 80 p. 15,5 × 11,5 cm. La unua en poŝtformata serio. Prezo: 2,00 gld. (8 st.)

Tra la Mondo

Aŭstrujo

● **Antaŭkongresa ferio-semajno** okazos en Vieno, de la 28-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto. Informojn donas Aŭstria Esperantista Federacio, Wien XV, Fünfhausgasse 16.

Bulgarujo

● **En la filologia fakultato** de Sofia Universitato ekde ĉi tiu jaro estas nedeviga oficiala kurso de Esperanto.

● **Ĉe Unuiĝo de Sciencaj Laboristoj** (sciencistoj en universitatoj kaj esploraj institutoj) fondiĝis Esperanta sekcio kun 60 membroj.

Ĉinujo

● **En Esperanto eldonas** nun krom Ĉina Esperanto-Ligo ankaŭ la Fremdlingva Eldonejo en Pekino. La unuajn titolojn vidu sub "Ricevitaj Eldonaĵoj".

● **9 novaj studrondoj** ekfunkciis en Pekino. Aliaj grupoj fondiĝis en Hangĝou, Vuhan kaj Harbino.

● **Novaj eldonoj** de lernolibro kaj vortaro E-ĉina aperis fine de 1962.

Francujo

● **Oficiala poŝta stampo** reklamos dum 4 monatoj la nacian kongreson ĉe Perpignan (1-3/6).

Hispanujo

● **Stariĝis tendumejo** Esperantista ĉe la kantabra marbordo. Informas: Club Camping Internacional, Strato La Paz 5, Bilbao.

Jugoslavio

● **86 kursojn en 12 landoj** jam kunligis koresponde la centro "Ora Spiko", fondita fine de 1961 en Zagreb por entuziasmigi Esperanto-kursanojn per grupa korespondado kaj interŝanĝaj vizitoj. Adreso: Korenička 11, Zagreb V.

Pollando


● **Prezidanto de Pola Akademio de Sciencoj**, prof. d-ro Tadeusz Kotarbinski, deklaris lastatempe: "Mi povas certigi vin, ke demandota pri mia opinio rilate al Esperanto, la internacia lingvo, mi ĉiam donos mian plenan subtenon; la lingvon mem kaj ankaŭ la organizaĵojn de Esperantistoj mi pritaksas kiel tre avantaĝa kaj utila socia movado.

● **Diploman disertacion** pri "funkcioj de la Esperanta gazetaro" preparas kun oficiala konsento Roman Dobrzynski por la ĵurnalisma fakto de Varsovia Universitato.

Svedujo

● **Dum la jarkongreso** de Sveda Esperanto-Federacio en Lund pentekoston 1963 la poŝto uzos specialan esperantostampon por la kongresaj poŝtaĵoj. Mendu antaŭ la

15-a de majo ĉe LJK memorigan poŝtkarton kun la stampo. Prezo 2 rkp por 1 stampita karto, 4 rkp por 3 kartoj kun 3 diversaj stampoj. Kunsendu paperstrion (1 por ĉiu karto) kun nomo kaj adreso, al: Esperanto-Kongresen 1963, Lund.



Svislando

● **Internacia Ferio-semajno** jam la 5-an fojon okazos apud Solothurn, 1-7/9/63. Prospekton sendas: Hans Hunkeler, Poŝtfako 417, Aarau.

Usono

● **Banko de Interŝanĝado**, kiu celas ebligi internaciajn "aĉetojn", abonojn, k.s., sen uzo de mono, fondiĝis en Usono. Detale informas: Conrad Fisher, 808 Stewart Street, MEADVILLE, Pa.



● **Infanoj kantis** kaj parolis en Esperanto en televida programo de San Francisco.

Venezuelo

● **En la Universitato de Caracas** ekde 16.1.63 funkcias baza kurso de Esperanto organizita de la Fakto de Ĝeneralaj Studoj de la Direkcio de Kulturo. Klasojn gvidas 3-foje semajne Lino Moulines kaj Fernando de Diego.

Laŭfako

Filatelo

● **En almenaŭ unu sfero** malkreskas la influo de la grandaj eŭropaj lingvoj: sendependiĝantaj nacioj de Azio kaj Afriko preferas siajn poŝtmarkojn ornamita per propralingvaj surskriboj. Cejlona poŝtmarkoj jam de longe portas tekstojn en sinhala kaj tamila lingvoj; tiuj de Filipinaj Insuloj nun portas la vortojn "Pili-pinas" kaj "Koreo", anstataŭ la anglaj "Phillipines" kaj "Postage"; Tanganjiko ĵus nomiĝis "Jamhuri ya Tanganyika" kaj Madagaskaro: "Repoblika Malagasy".

Instruistoj

● **La Jarraporto** de SBET estas menciita en pli ol 30 britaj ĵurnaloj kaj gazetoj. Pli seriozaj ĵurnaloj raportis sufiĉe amplekse, kaj el tiuj citis jam ankaŭ usonaj ĵurnaloj.

Ornitologio

● **Jam de du jaroj** S-ro W. De Smet (nova adreso: Hendrik Meyslaan 9, Deurne-Antwerpen, Belgujo) entreprenas per Esperanto scienca enketon pri la printempa migrado de la kukolo. Vi ankaŭ helpu al li, kolektante informojn pri la unuaj observoj de tiu birdo en via regiono (speciale interesa afero por instruistoj). Sendu jenajn observojn al li: a) nomo de la observloko kaj situo rilate gravan urbon; b) dato de la alveno de la unuaj kukoloj; c) aspekto de la regiono; ĉ) (se eble) veterkondiĉoj dum la pasintaj tagoj; d) via nomo kaj adreso. Kun anticipa danko!

Esperantista Vivo

NASKIĜOJ

Tuinder. Je 19.2.63 naskiĝis Joĉjo (Jefke), dua filo de Jacques A. Tuinder kaj Vera S. Tuinder-Dekker.

GEEDZIĜOJ

Banaš-Marinov. Inez Banaš el Katowice, Pollando, kun Ljubomir Marinov, el Ruse, Bulgarujo.

Hoffmann-Reisel. Franciszka Hoffmann, el Chorzów, Pollando, kun Rudolf Reisel, el Tallinn, Estonio.

JUBILEOJ

Carlén. 40-jaran esperantistecon festas S-ro Erik Carlén, Svedujo, iama redaktoro de "Dia Regno", prezidanto de KELI, verkinto de nova Esperanto-gramatiko por svedoj.



Sub la Alta Protektado de la Unua Vicĉefministro de Bulgarujo, Georgi Trajkov.

Konstanta Adreso: U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALAJ KOMUNIKOJ

N-ro 9

Rotterdam, la 12-an de febr. 1963

Dua Bulteno.

Al ĉiuj aliĝintoj estas sendita la Dua Oficiala Bulteno. En ĝi troviĝas ĝeneralaj informoj pri la Kongreso, ties kompleta proŭizora programo, programoj de la Infana Kongreseto, Cseh-Seminario, Junulara Kongreso en Vraca, plenaj informoj kun mendilo por loĝado, ekskursoj kaj bankedo. En la Bulteno troviĝas krome informoj kaj regularoj pri la Oratora kaj Belarta Konkursoj.

19-a TEJO-Kongreso.

Tri vesperoj el la provizora programo de la Kongreso estas rezervitaj por la junaj amatoroj de la teatro, kantado, recitado kaj dancado. Ĉiuj unuopaj esperantistoj aŭ junularaj grupoj, kiuj intencas iamaniere partopreni la belartajn programerojn de la Junulara Kongreso estas insiste petataj sin anonci plej malfrue ĝis la fino de marto. Tio celas nuran orientiĝon de la Kongresa Komitato pri la eventuala amplekso de la programoj kaj estas neniel engaĝiga ĉu por la sinanoncinto ĉu por la Kongresa Komitato.

Karavano.

Anoncis flugkaravanon Sveda Esperanto-Federacio. Detalojn donas S-ro Jan Str  nne, Amiralsgatan 36, Halm  , Svedujo.

o

N-ro 10

Rotterdam, la 13-an de febr. 1963

Korekto.

En la Oficiala Komunikado No. 7 la nomo de la Ministro pri Klerigo kaj Kulturo estas erare skribita: la korekta nomo estas Gan  o Gannev.

N-ro 12

Rotterdam, la 14-an de marto 1963

Vizo por Bulgarujo.

Kelkaj kongresanoj demandis, ĉu necesas montri atestilon pri pagitaj hotelkostoj por povi ricevi la vizon. Tio ne estas necesa. Laŭ cirkulero no. 42694 de la Ministerio pri Eksteraj Aferoj la Ambasadoj kaj aliaj bulgaraj diplomatiaj reprezentantoj en eksterlando (ili estas menciitaj en la Dua Bulteno) donos la enirvizon kontraŭ prezento de la kongreskato. Kiel jam menciite, la kongresanoj ĝuas ankaŭ 50% da rabato je la kostoj de la vizo.

Foto-konkurso.

Jenaj informoj estas aldonaj al tiuj aperintaj sur p. 52 (marta eldono).

Rajtas partopreni en la Ekspozicio kaj en la Fotokonkurso ĉiu organizita esperantisto maksimume per kvin fotoj.



Por ĉiu kategorio (nigra-blanka kaj kolora) estos jenaj premioj: 1a premio 100 guldenoj; 2a premio 75 guldenoj; 3a premio 50 guldenoj. Krom tio certe estos ankoraŭ kelkaj premioj donitaj de diversaj instancoj.

Ne estas akceptataj fotoj, kiuj

jam aperis en iu ajn revuo, gazeto, ĵurnalo, ekspozicio k.s. Ĉiuj fotoj devas esti faritaj de la konkursantoj mem.

Programo por neesperantistoj.

En kunligo kun la Arta Festivalo, la Loka Kongresa Komitato estas aranĝanta, kunlabore kun la bulgaraj kulturaj instancoj, specialajn prezentadojn por neesperantista publiko. Tiujn prezentadojn partoprenos kunlaborantoj en la Arta Festivalo. Por la okazo estos aranĝita speciala "Semajno de Internacia Amikeco".

Infana Kongreseto.


Ni atentigas la interesintojn ke la Loka Kongresa Komitato estas devigita limigi la nombron de la aliĝoj por la 8-a Internacia Infana Kongreseto. Pro tio ĝi instigas al kiel eble plej baldaŭa aliĝo. Informoj kaj aliĝiloj troviĝas en la Dua Oficiala Bulteno kaj estas riceveblaj ĉe la konstanta adreso de la 48-a U.K. (Infana Kongreseto).

Statistiko (ĝis 14-3-'63):


Arabujo 1, Argentino 2, Aŭstralio 4, Aŭstrujo 20, Belgujo 35, Brazilio 2, Britujo 77, Bulgarujo 560, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 43, Finnlando 37, Francujo 213, Germanujo (Okc) 86, Germanujo (Or.) 22, Hispanujo 6, Hungarujo 79, Islando 2, Israelo 1, Italujo 122, Japanujo 5, Jugoslavio 24, Kanado 2, Madagaskaro 1, Maroko 2, Meksiko 4, Monako 3, Nederlando 93, Nigerio 2, Norvegujo 8, Nov-Zelando 4, Pollando 270, Rumanujo 1, Sovetunio 41, Svedujo 106, Svislando 10, Usono 9. Entute 1899 el 36 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongresa Sekretario.



En ĉi tiaj konstruaĵoj de la Studenta Urbeto en Sofio estos la komuna loĝejo de la 48-a U.K.



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Ivo Osibov, Sinjskih Žrtava 13/II SPLIT,
Jugoslavio.

INVITO AL KUNLABORO

La Komitato kaj la Estraro de TEJO faras grandajn planojn por atingi pli grandan rekonon de TEJO en internaciaj junularaj medioj kaj per tio helpi al disvastigo de la Internacia Lingvo inter la junularo. Sed ni ne scias, kion la junaj esperantistoj opinias pri la nuna stato de TEJO. Ĉu ĝi kun sia nuna organizo konvenas por tiel grandaj taskoj? Ĉu ĝi kapablas plenumi ilin? Tial hodiaŭ ni starigas la demandon al niaj junaj legantoj:

Kia estu TEJO?

Ili bonvolu per letero informi la Redaktoron pri siaj opinioj: kia estas nuna TEJO, kion ili volas havi de ĝi, ĉu ĝi kontentigas iliajn interesojn, kiajn proponojn ili havas, ktp. La respondoj nepre atingu la Redaktoron antaŭ la 20-a de Majo, por ke ni povu en la Julia numero jam publikigi la opiniojn de la legantoj. La kolektita materialo certe prezentos interesan bazon por la diskutoj dum la 19-a IJK en Vraca.

La Jaro de la Junularo en la Esperanto-Movado jam komenciĝis. Kion faris via grupo, via landa sekcio? Kiajn sukcesojn ili ĝis nun atingis? Kiajn problemojn en la realigado de la Laborplano ili renkontas? Skribu pri tio al la "Juna Vivo". La gejunuloj en aliaj lokoj kaj landoj kun intereso legos viajn kontribuojn.

Redaktoro

DUM MAJO EN VARNA LA IV-a TUTLANDA ESPERANTISTA JUNULARA BALO-FESTIVALO DE BEJ

Ĉiujare la apudmara belulino Varna allogas turistojn kaj somerumantojn el la tuta mondo. Iom antaŭ la vigla somera sezono, dum majo ĉi jare tie kolektiĝos la junaj bulgaraj esperantistoj por partopreni la lastan provon antaŭ la internaciaj Esperanto-kongresoj en Vraca kaj Sofio – la tradicion junularan balon-festivalon (la 11-12. V.1963). La intereso al tiu plej amasa aranĝo de BEJ kreskadis de jaro al jaro, por atingi dum 1962 en Ruse la rekordan partoprenon de 1600 gejunuloj el la tuta lando.

Ĉi jare la celo de la aranĝo estos ne la amaseco, sed precipe la akcento al la kulturaj aspektoj de la movado. En la formo de Festivalo-konkurado ĝi devas ebligi la elekton de la plej altnivelaj junulaj artgrupoj, per kiuj la bulgaraj gejunuloj inde prezentiĝos dum la internaciaj kongresoj.

La aranĝo ampleksos unue junularan balon – sabate vespere, en la apudmara restoracio ĉe la internacia somerrestadejo "Drujba", kelkajn kilometrojn norde de la urbo. Dimanĉe matene en la kulturdomo de la ŝipkonstruistoj okazos la koncerto-festivalo de la amatoraj junularaj artgrupoj. Al la

plej bonaj junulgrupoj kaj individuaj amatoraj geaktoroj la Organiza Komitato disdonos valorajn premiojn kaj distingos ilin per diplomoj.

Samtempe antaŭ interesiĝantoj pri la parolarto okazos la "landa" oratora konkurso, kiu same celas la elekton de la plej kapablaj reprezentantoj de BEJ, kiuj konkuros kun siaj alilandaj amikoj en Vraca kaj Sofio, dum la internaciaj oratoraj konkursoj.

La Balo-Festivalo de BEJ estos nova valora kontribuo de la bulgara junularo en la Esperanto-movado, dum 1963 – la Jaro de la Junularo.

S. S.

SEJEAM JARKUNVENIS

La 13-an de Januaro 1963 SEJEAM okazigis sian jarkunvenon. Kiel novaj gvidantoj de la Sekcio estas elektitaj s-roj Roger Randrianekena kaj Joelson Adolphe Rasolofonirina. La ĝisnunaj gvidantoj, s-roj Razafindra-Miandra kaj Raveloson loĝas nun en Francujo kaj pro tio ili ne povis plu gvidi la Sekcion. Tamen s-ro Raveloson plu restas redaktoro de la bulteno de la Sekcio.

Adreso de nia Madagaskara sekcio estas: Junulara Esperantista Organizo "SEJEAM", 176, Route Circulaire, Tananarive, Madagaskaro. Informis E. Raveloson



■ La Kongresan Komitaton atingis la unuaj reeĥoj de la informado antaŭ neesperantistaj junularaj organizaĵoj. THE LIBRARY OF CONGRESS WASHINGTON deziras publikigi informojn pri la kongreso en siaj bultenoj. La Monda Federacio de la Demokrata Junularo en BUDAPEST kaj INTERNATIONAL UNION OF STUDENTS en PRAHA tre verŝajne sendos observantojn.

■ La temoj de la Oratora Konkurso estis fiksitaj jene:

Kiel mi konceptas la mondon en 2000-jaro.

Kiel arto povas kontribui al paco?

Kion fari por ne vane ellerni Esperanton?

Ĉu estas Esperanto por mi vera funkcia rimedo por internaciaj kontaktoj?

■ Okaze de la Junulara Jaro kaj la Kongreso en Vraca la KK eldonis belegan glumarkon, kiu estas vendata je eksterordinare malalta prezo. Mendu tuj kvanton ĉe UEA! Ornamu viajn leterojn! Apogu la junularan Esperanto-movadon!

■ La KK invitis la konatan esploriston kaj mondvojaĝanton Tibor Sekelj prelegi dum la Kongreso en Vraca pri sia lasta esplorvojaĝo tra Afriko, ĉefronte de la "Kara-vano de amikeco".

■ Kiel tradicie, dum la Kongresa Balo en Vraca estos elektita Miss Esperanto – 1963. Pri ŝia premio oni interesis ankaŭ teksan fabrikon en la urbo.

■ La loka ĵurnalo "Oteĉestven zov" jam kelkfoje publikigis informojn pri la antaŭkongresaj preparoj. Oni antaŭvidas en ĝi esperantlingvan "kurieron" dum la kongresa semajno.

■ **Statistiko:** Ĝis la 31 de januaro 1963 aliĝis 74 gejunuloj el 3 landoj (Bulgarujo, Germanujo (or.), Pollando). La Kongresan Bultenon kaj aliĝilon petis pluraj gesamideanoj el: Britujo, Danlando, Izraelo, Francujo, Germanujo (okc.), Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Sovetunio, Svedujo kaj Skotlando.

LETERO AL INFANO

Kara Katóka,

Mi dankas al vi pro via aliĝo. Bonvolu ricevi vian kongresan karton kaj memoru, ke ĝi estas la sola oficiala dokumento, per kiu vi rajtas partopreni la 8-an Infanan Kongreseton en Sofio.

Ni senlace laboras por aranĝi la kongreseton tiel, ke vi pasigu feliĉan kaj ĝojan semajnon en nia gastama lando.

La infanoj-kongresanoj disponos oportunan loĝejon. La ludoj kaj amuzadoj okazos en bela parko, kie troviĝas diversaj ludejoj. Okazos ankaŭ ekskurso per aŭtobuso al "Vitoŝa-monto".

Oni intencas aranĝi Infanan Artan Ekspozicion de Desegnaĵoj kaj Pentraĵoj. La ilo povas esti: koloraj kraĵonoj, paŝteloj, akvarelo, inko, kraĵono k.a. La temo estos laŭ la plaĉo de la partoprenanto, sed preferinda estas la reprezento de ia aspekto el la vivo en la lando de la kongresano. La bildo ne devas esti malpli

granda ol folio kun jenaj dimensioj: 20/28 cm. kaj devas havi marĝenon de almenaŭ 3 centimetroj ĉirkaŭe. En la malsupra marĝeno estos skribita la nomo, la aĝo, la lando kaj la titolo de la bildo.

Ni deziras ankaŭ aranĝi Spektaklon kun la partopreno de la gekongresanoj. Ĝi okazos sur la scenejo de la Somera teatro en la Parko de la junpioniroj. Se vi deziras, pretigu ion por tiu Spektaklo: kanto, deklamo, danco, muzikludo k.a.

Ni intencas organizi la aferon tiel, ke nia kongreseta semajno estu semajno de ĝojo kaj kantoj. Vi ricevos sur apartaj folioj tekstojn de kantoj, kiujn ni intencas kanti, por ke vi povu antaŭe lerni ilian tekston.

La detalan programon vi ricevos pli malfrue.

Kara Katóka, mi deziras al vi sanon kaj feliĉan kongresan semajnon.

Kore salutas vin

Radka Rajnova

Ni Citas

George L. Baurley, Universitato de Rostock: "Mi ne povas imagi Esperanton kiel idealan komunan lingvon por voĉaj diskutoj inter partoprenantoj de internaciaj kunvenoj."

Bulteno de ISAE: "S-ro Briscoe piedis per pli aktiva propagando" - pri tio neniu plandos.

Antaŭ 50 jaroj (el "Esperanto", januaro 1913): "Leviĝis malgranda, sed militema, batalioneto, kies ordonvorto estis: 'Ni nur uzu la vortojn de la Universala Vortaro! For! ne nur ĉiuj neologismoj nunaj, sed ankaŭ ĉiuj malnovaj terminoj jam de longe uzataj! La Fundamenton, nur la Fundamenton, nenion krom la Fundamenton ni volas koni!' Tia sintenado estis cetere tre malfacila; ĉar unuflanke oni devis por tio perfekte koni ĉiujn vortojn de la Universala Vortaro kaj aliflanke forgesi multnombrajn vortojn ne apartenantajn al la U.V., kiuj, de dudek-kvin jaroj, enŝoviĝis en nia lingvo. Tia pretendo ne povis ja daŭri, kaj hodiaŭ la lastaj fideluloj de tiu malprogresema teorio estas tiel malmultaj, ke oni ilin povas kalkuli per la fingroj. Tamen ankoraŭ freŝdate oni povis legi anoncojn de paroladoj, en kiuj la parolantoj sciigis, ke 'ili nur uzos la vortojn de la U.V.'..."

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Ĉiutage	15.30-16.00	Warszawa, 200m. (1502 kcs), 49.88m., 49.38 m., 42.11m., 41.99m., 41.27m., 31.45m., 31.01m. P. Esperantaj disaŭdigoj, Pola Radio, Warszawa, Pollando.
Dimanĉo	19.00-19.25	Sofia, 48.62m. (6170 kcs), 39.11m. (7670 kcs). P. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	23.30-23.55	Sofia, 41.35m. (7255 kcs), 25.32m. (11850 kcs). P.
	12.20-12.30	Bern, 48.66m (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs). Svisa Radio, S.O.C., Giacomettistr. 1, Bern, Svislando.
	17.15-17.30	Valladolid, 203m. (1475 kcs). K. Radio Valladolid, Hispanujo.
	22.40-22.55	Hilversum, 298m.(1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs). P., N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	16.50-17.00	Wien. 577m. (520 kcs). 514m. (584 kcs) 293m. (1025 kcs). 25.45m. (11785 kcs). P. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m. (5960 kcs), 41.24m. (7270 kcs), 30.90m. (9710 kcs). P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
Merkredo	11.00-11.30	Pjongjang. 360m. (820 kcs), 286m. (1050 kcs), 278m. (1080 kcs), 48.00m. (6250 kcs). I.P. Centra Radio-Komitato, Pjongjang, Norda Koreo.
	12.20-12.30	Bern. Kiel lunde
	17.15-17.30	Valladolid. Kiel lunde.
	17.45-18.00	Rio de Janeiro, 375m. (800 kcs), 50.08m. (5990 kcs), 30.71m. (9770 kcs), 25.40m. (11.950 kcs). 16.78m. (17.880 kcs). K. I. Rádio Ministério da Educação, Praça da República 141-A, Rio de Janeiro, Brazilo.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	18.45-19.00	Resende, 1961m. (153 kcs). P. Radio Agulhas Negras ZYP 22, Praça Oliveira Botelho, Resende (Rio de Janeiro), Brazilo.

GEONKLOJ ESPERANTISTAJ

Administranto: J. H. Sullivan (Del. U.E.A.)
3, Berwick Avenue, Urmston,
Manchester, Anglujo.

GEONKLOJ ESPERANTISTAJ estas skemo por helpi junajn Esperantistojn per kunligado koresponda kun plenaĝuloj. La lernado de Esperanto, aparte ĉe la infanoj, nepre postulas postan uzadon, kaj la plej oportuna rimedo por praktika uzado estas internacia korespondado. Sed ofte la infanoj havas nesufiĉan sperton por daŭre korespondi kun samaĝuloj.

La sistemo postulas liston de 'Geonkloj' servopretaj, el multaj landoj, tiel, ke kiam infano sendas peton ni povos tuj kontentigi lin aŭ ŝin.

LA DEVOJ DE LA GEONKLOJ ESTAS:

- Korespondi kun la geinfanoj kaj amikiĝi kun ili;
- Gvidi ilin lingve, sed delikate, por ke la korespondado ne fariĝu kvazaŭ hejmtasko de la lernejo;
- Teni ilian intereson pri Esperanto, kaptante okazojn por montri ĝian internaciecon;

ĉ) Memori festotagojn, sendante taŭgan donaceton je tiaj okazoj.

La administranto volonte aŭdos de gesamideanoj pretaj partopreni ĉi tiun tre gravan — kaj ambaŭdirekte feliĉigan — servon.

Sed bovolu ankaŭ instigi taŭgajn infanojn!

Nepraj kondiĉoj estas:

- La infano mem skribu leteron petante onkl(in)on;
- La infano vere deziru korespondi kaj progresi en Esperanto;
- Geinstruistoj NE sendu nurajn listojn de nomoj kaj adresoj;
- Ĉiu infano sendu rpk, se havebla en ties lando.

Fine, ĉar GEONKLOJ ESPERANTISTAJ ricevas nenian subvencion, krom donacoj de kelkaj bonvolemaj samideanoj, la administranto tre volonte aŭdos de pluaj bonvolemaj samideanoj!


Radio Roma. 2-IV, Tra la literaturo; 5-IV, Italaj belartaj urboj: Mantova; 9-IV Novaĵoj el Italujo; 12-IV, Reviviĝo de Jesuo kaj la du disĉiploj el Emmaus; 16-IV, Italaj kanzonoj en Esperanto; 19-IV, Romo kaj ĝia universaleco; 23-IV, Leterkesto; 26-IV, La Roland-kanto kaj ĝia sukceso en Italujo; 30-IV, La mirindaj grotoj de Castellana en suda Italujo. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

	23.00-23.15	Guatemala, 469m. (640 kcs), 48.54m. (6180 kcs), 30.75m. (9760 kcs.) I.K. Radio Nacional T. G. W., Guatemala Cd, Mez-ameriko.
Ĵaŭdo	06.00-06.15	Gdańsk, 230m. (1303 kcs). I.K. Pola Radio, ul Uphagena 1. Gdańsk-Wrzeszcz, Pollando.
	08.35-08.45	Paris. 280m. (1070 kcs), 235m. (1277 kcs), 242m. (1241 kcs), 222m. (1349 kcs), K. Esperanto Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	17.15-18.00	Praha, 233m. (1286 kcs). I. Radio Praha, Disaŭdigoj por Aŭstrujo, Praha, Ĉeĥoslovakujo (nur la lastan ĵaŭdon de la monato; kvinminuta rubriko dum germanlingva programo).
	20.30-20.45	Volta Redonda, 1560m. (192 kcs). P. Radio Sidurgica Nacional ZYP 26, Volta Redonda (Rio de Janeiro), Brazilo.
	21.15-21.25	Bern 48.66m. (6165 kcs), 31.46m. (9535 kcs), 31.07m (9655 kcs), 25.61m. (11715 kcs). P.
	22.05-22.20	Zagreb, 264m. (1135 kcs). P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.00-23.10	Valencia, 193m. (1379 kcs). P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
Vendredo	10.00-11.10	Praha, 49m., 41m., 31m. I (Ripeto de la ĵaŭda rubriko la morgaŭan vendredon; kvinminuta parolado dum germanlingva programo).
	17.15-17.30	Valladolid. Kiel lunde.
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.00-22.10	Hilversum, 298m. (1007 kcs) aŭ 402m. (746 kcs). P. V.A.R.A., Poŝtkesto 175, Hilversum, Nederlando.
Sabato	9.45-10.00	Rio de Janeiro, 214m. (1400 kcs). K. Radio Roquete Pinto Av. Almirante Barosso 81, Rio de Janeiro, Brazilo.
	19.00-19.15	Teresina, 259m. (1160 kcs.), 62.56m. (4795 kcs). P. Radio Pioneira de Teresina, Rua Teodoro Pacheco 1179, Teresina, (Piauí). Brazilo.
	21.15-21.25	Bern. Kiel ĵaŭde.

ŜAKA RUBRIKO

Gvidas D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio

Problemo n-ro 27 (Konkurso 1963 — n-ro 3)



Torsten Lindberg (Svedujo) — el Schackvärlden 1944.

Mato en 3 movoj. Pro ĝusta solvo 3 poentoj.

Kontrolo:

Blanko: Rh6, Dd2, Td4,
p.: b4, g2, g7

Nigro: Re 5, Ta6, Ke6,
p.: a5, b6, d7, e4, g6

Solvojn sendu ĝis 31.7.'63 al la gvidanto de la rubriko.

Memoriga Kalendaro

Aprilo

1-7 Paska Kultura Semajno en Grésillon.
12-15 E-ista renkontiĝo, Morwell, Aŭstralio
13-16 Kongreso SAT-Amikaro, Rouen
Pasko Argentina Kongreso, Venado Tuerto
14-15 2-a Markola Kongreso, Dovro
28 E-tago ĉe int. Komerca foiro, Lille

Majo

10-13 Germana Kongreso, Würzburg
11-12 Junulara Balo, Varna
11-17 15-a IFEF-Kongreso en Stoke-on-Trent
21-24 Skota Kongreso, Glasgovo
23-26 Int. Naturamika Renkontiĝo, Freudstadt
31 Limdato por Belartaj Konkursoj
31-3/6 Brita Kongreso, Hastings

Pentekosto

Dana Kongreso, Kolding
Norvega Kongreso, Stavanger
Sveda Kongreso, Lund

Junio

1-3 Franca Kongreso, Perpignan.
1-8 Int. Junulara Kunveno de GEJ, Nigra Arbaro
30-15/9 Kursoj, ferioj ĉe Grésillon

Julio

1-3 Beneluksa Kongreso, Antverpeno
1-20 FERIA Kurso por Esperanto-instruistoj, Gdańsk
5-7 Usona Kongreso, Pittsburgh
6-10 Hungara Somera Universitato, Gyula
15-28 Somera Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio
20 Limdato foto-konkurso U.K.
20-26 SAT-Kongreso, Hamburg
21-25 Pola Kongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento", Szczecin
21-28 FERIAj kursoj, Helsingör
25-28 Hispana Kongreso, Barcelona
25-1/8 KELI-Kongreso, Graz
27-3/8 TEJO-Kongreso, Vraca
28-1/8 Lerneja Konferenco, Beograd
28-1/8 Antaŭkongresaj Ferioj, Vieno
29-11/8 Dua tendaro ĉe Lančov

Aŭgusto

3-10 Universala Kongreso, Sofio
11-19 Int. Ferio-semajno, Krommenie

Septembro

1-7 Int. Ferio-semajno, Solothurn
14-19 Itala Kongreso, S. Vincent
14-21 Ferioj en "De Leemkule", Nederlando

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

NIEUWE BINNEWEG 176 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

N-ro 356

La 1-an de Marto 1963

DELEGITOJ

Danlando

Fakse (Sjaelland)
D: vakas.
FD (Prahistoria ŝtonepoko): vakas.

Køge

D: vakas.
FD (Horloĝistaj aferoj): vakas.

Rødovre

D: vakas
FD (Juro): vakas.

Finnlando

Imatra (Kymen Lääni)

D: vakas
FD (Turismo): vakas.

Kalanti (Turun ja Parin 1.)

D: vakas

Outokumpu (Kuopionlääni)

FD (Medicino): vakas.

Francujo

St. Brieux (C. de N.)

D: vakas.

Germanujo

Berlin

FD (Turismo): vakas.

Marburg (Hessen)

D: vakas.

Unterlüss (Niedersachsen)

D: vakas.
FD (Magio): vakas.

Italujo

Bologna

FD (Korespondado): vakas.

Jugoslavio

Kaštel-Gomilica (Dalmacija)

D: vakas.

Ljubljana (Slovenija)

FD (Arkeologio): vakas.

Nederlando

Utrecht (Utrecht)

JD: vakas.

Novzelando

Christchurch (Canterbury) 230.000

D: S-ro Bevan J. Clarke, docento pri kontado, Universitato de Canterbury, 12 Otara St., Fendalton.
FD (Komerco): la D.

Otaki (Wellington) 2.500

D: S-ino Colleen Margaret Larsen, P.O. Box 51. Tasman Road.

Upper Hutt (Wellington) 19.000

D: S-ro Jim Lawson, doklaboristo 22 Byron St.

Pollando

Bydgoszcz (Pomorze) 250.000

FD (skoltismo): S-ro Andrzej

Grzebowski, studento de historio, M. Curie - Skłodonwskiej 10/1.

Kłodzko (woj. Wrocław)

D: vakas.

Sud-Afriko

Ladysmith (Natal)

D: vakas.
FD (Religio Adventismo): vakas.

Paarl (Cape) 39.000

D: S-ro Bos Eduard Kok, preisto, 16 Montreux St. Courtrai.
FD (Sindikataj Aferoj): la D.

Svedujo

Hammarö (Värmland) 8.500

FD (Sporto-biciklado): S-ro Åke Holmén, paperlaboristo, Takene.

Karlstad (Värmland)

FD (Aŭtomobiloj): vakas.
FD (Librotenado): S-ro Arne Frändin, ĉefkontoristo, Styrnabsgatan 4.

Linköping (Ostergötland) 65.000

FD (Religio-Kristanismo): S-ro Nils Robert Anderwall, pensiita instruisto, Johannelundsvägen 43.

Stockholm

FD (Arbarkulturo): S-ro Ragnar Hjorth, ĉefforstisto, Vasagatan 36.

Usono

Baltimore (Maryland) 939.000

FD (Inĝenieraj aferoj): S-ro Lucian A. Spriggs, elektra inĝeniero, 127 Marburth Avenue.

Chicago (Illinois) 4.000.000

FD (Fiziko): S-ro Bruce Arne Sherwood, studento de fiziko, 5482 University.

Gallup (New Mexico) 14.000

FD (Bahaismo): S-ino Roan Orloff Stone, dommastrino, 504 North Fifth Street.

FD (Etnologio): la FD pri Bahaismo.

Homewood (Illinois) 13.000

D: S-ino Dorothy Denison, sekretariino, 17958 Homewood Avenue.

Richmond (California)

D: vakas.

San Diego (California) 618.000

D: S-ro Francis Helmuth, konstruisto, 5615 Beaumont Ave., La Jolla.
FD (Turismo): la D.

PATRONO 1963

1. Domingues, D-ro C., Rio de Janeiro, Brazilo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Zijp, S-ro Louis van der, Duffel, Belgujo.

Miĉovan F-ino Jaroslava, Praha, Ĉeĥoslovakujo.

Ibsen, S-ro Thor, Bording, Danlando.

Koivu, F-ino Sirkku, Kåpylä, Danlando.

Simonnet, S-ro François, Vincennes, Francujo.

Laade, F-ino Marie, Berlin-Steglitz, Germanujo.

Vlies, S-ro Drs. C. v. d., Rotterdam, Nederlando.

O'Brien, S-ro Linc, Albuquerque, Usono.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1963

213. Stempel, F-ino O., Subiaco, Aŭstralio; 214. Boffejan, S-ro Hector, Brasschaat, Belgujo; 215. De Boes, S-ro Gérard, Gent, Belgujo; 216. Degryse, S-ro André, Roeselare, Belgujo; 217. Geers, F-ino Blanche, Antwerpen, Belgujo; 218. Jaumotte, S-ro M., Wilrijk-Antwerpen, Belgujo; 219. Kestens, F-ino M., Bruxelles, Belgujo; 220. Staes, S-ino E., Bruxelles, Belgujo; 221. D'Amorim, D-ro Nid Dutra, Itabuna, Bahia; 222. Araujo, S-ro Getúlio Soares de, Rio de Janeiro, Brazilo; 223. Araujo, F-ino I. Baggi de, Rio de Janeiro, Brazilo; 224. Augusto, S-ro Obdrego, Barra Mansa, Brazilo; 225. Barbosa S-ro Ant. de Souza, Volta Redonda, Brazilo; 226. Bondarovsky, S-ro E., Barra Mansa, Brazilo; 227. Bondarovsky, S-ro Samuel, Barra Mansa, Brazilo; 228. Gomes Braga, S-ro I., Rio de Janeiro, Brazilo; 229. Brass, S-ino Helena, Curitiba, Brazilo; 230. Costa, S-ro Fr. Ferreira da, Rio de Janeiro, Brazilo; 231. Costa, F-ino Yolanda de Araujo,

Rio de Janeiro, Brazilo; 232. Coutinho, S-ro Antonio Caetano, Rio de Janeiro, Brazilo; 233. Dionisio, S-ro Carlos H., Sao Leopoldo, Brazilo; 234. Drucker, S-ro Gert, Curitiba, Brazilo; 235. Farias, S-ro Benedito Fig., Feira de Santana, Brazilo; 236. Flores, Ing. Alberto, Volta Redonda, Brazilo; 237. Franco, S-ro Luiz Carlos, Recife, Brazilo; 238. Gama, S-ro Joao de Oliveira, Juiz de Fora, Brazilo; 239. Lima, S-ro Alvaro H., Rio de Janeiro, Brazilo; 240. Nunes, S-ro Elmo Pereira, São Paulo, Brazilo; 241. Oliveira, S-ro Lauro Jorge, Santos, Brazilo; 242. Pauluk, S-ro José, Londrina, Brazilo; 243. Pádua, Generalo Geraldo, Belo Horizonte, Brazilo; 244. Peixoto, S-ro Octavio, Niterói, Brazilo; 245. Pinto, S-ro José Dias, Santo André, Brazilo; 246. Real, S-ro Pedro, Paranavaí, Brazilo; 247. Rezende, D-ro C., Belo Horizonte, Brazilo; 248. Santos, S-ro Hizo G. dos, Curitiba, Brazilo; 249. Santos, S-ino Z. C., Teofilo Otoni, Brazilo; 250. Silva, S-ino Irene Machado da, Rio de Janeiro, Brazilo; 251. Souza, S-ro Nelson Pereira de, Brasília, Brazilo; 252. Varanda, S-ro José, Petropolis, Brazilo; 253. Vaz, S-ro A. J., Rio de Janeiro, Brazilo; 254. Vianna, D-ro Lincoln Martins, Belo Horizonte, Brazilo; 255. Wehrs, F-ino E., Niteroi, Brazilo; 256. Atkinson, S-ro G. B., London, Britujo; 257. Atkinson, S-ro Wilfrid G., Worcester Park, Britujo; 258. Hamilton, S-ro J. M., London, Britujo; 259. Knight, S-ino E. B., London, Britujo; 260. Phelan, S-ro H. K., Old Bexley, Britujo; 261. Pilling, S-ino F. K., Blackpool, Britujo; 262. Sly, S-ro Kenneth A., Letchworth, Britujo; 263. Thornber, S-ro J. C., Accrington, Britujo; 264. Withey, S-ro D. H., Liverpool, Britujo; 265. Zeiner, S-ro B. R., Barry, Britujo; 266. Pedersen, S-ro Johannes, Kolding,

Danlando; 267. Rude, S-ro Victor, Stenlille, Danlando; 268. Schleicher, S-ro Ib, Kobenhavn, Danlando; 269. Thune, S-ino Lis, Hvidovre, Danlando; 270. Arrieu, S-ro F., Toulouse, Francujo; 271. Bideau, S-ro A., Dijon, Francujo; 272. Boiton, F-ino M. T., Granges les Valence, Francujo; 273. Borel, S-ino, Ardes, Francujo; 274. Delahaye, S-ro I., Petitville, Francujo; 275. Dieudonne, S-ro Marcel, Tarbes, Francujo; 276. Renaux, S-ro Adolphe, Puteaux, Francujo; 277. Lemonnier, F-ino Germaine, Asnières, Francujo; 278. Llorens, S-ro Robert, Montelimar, Francujo; 279. Marly, S-ro Pierre, Bordeaux, Francujo; 280. Petit, S-ro P., Rosny-sous-Bois, Francujo; 281. Bechtold, S-ro Ludwig, Gladenbach, Germanujo; 282. Bepperling-Wolff, S-ino A., Wetzlar, Germanujo; 283. Bily, S-ro Harry, Berlin, Germanujo; 284. Carstensen, S-ro Th., Ahrensböck, Germanujo; 285. Daum, S-ro Hubert, Wiedenbrück, Germanujo; 286. Jacobsthal, S-ro Alfred, Rendsburg, Germanujo; 287. Lamprecht, D-ro Hermann, Essen, Germanujo; 288. Sandrock, S-ro Otto, Essen, Germanujo; 289. Schumacher, S-ro F., Karlsruhe, Germanujo; 290. Wehrheim, D-ro H., Hildesheim, Germanujo; 291. Wolff, S-ro Johann, Köln, Germanujo; 292. Wuenschel, S-ro Hans Ph., München, Germanujo; 293. Puig, S-ro Llibert, Sabadell, Hispanujo; 294. Campetti, Prof. D-ro Caetano, Lucca, Italujo; 295. Lacalendola, Prof. A., Bari, Italujo; 296. Minnaja, S-ro L., Roma, Italujo; 297. Pacelli, Prof. Giuseppe, Pisa, Italujo; 298. Tursi, D-ro Nestore, Roma, Italujo; 299. Jovanović, S-ro Živojin M., Niš, Jugoslavio; 300. Romano-Joly, S-ro, Dolisie, Kongo; 301. Armanis, S-ro Andrejs, Lier, Norvegujo; 302. Engen, S-ro Per, Drammen, Norvegujo; 303. Reisaeter, S-ro Trygve, Odda, Norvegujo;

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1963

Stato je la 31-a de januaro

Konkurso I

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Finnlando	2570	2645	102,92
2. Svislando	2141	1715	80,10
3. Britujo	6368	4778	75,03
4. Francujo	7225	5414	74,93
5. Nederlando	5068	3570	70,44
6. Belgujo	1695	1185	69,91
7. Svedujo	6640	4640	69,88
8. Usono	4110	2680	65,21
9. Danlando	2936	1745	59,43
10. Hispanujo	2696	1545	57,31
11. Brazilo	3856	2144	55,60
12. Germanujo	7221	3965	54,91
13. Japanujo	3240	1730	53,40

14. Norvegujo	1755	900	51,28
15. Italujo	4220	1860	44,08
16. Jugoslavio	5180	900	17,37

Konkurso II

1. Portugalujo	515	410	79,61
2. Aŭstralio	1233	830	67,32
3. Kanado	769	500	65,02
4. Aŭstrujo	1475	775	52,54
5. Islando	250	125	50,—
6. Israelo	300	140	46,67
7. Madagaskaro	250	100	40,—
8. Nov-Zelando	1167	350	29,99
9. Urugvajo	250	45	18,—
10. Argentino	905	100	11,05
11. Sudafriko	250	25	10,—

Vidu la regulojn sur paĝo 26 (Febr. 1963).

304. Rego, S-ro M. Lopes do, Lisboa, Portugalujo; 305. Agge, S-ro Karl, Stockholm, Svedujo; 306. Akselson, S-ro H., Stockholm, Svedujo; 307. Almén, S-ro Helmer, Bromma, Svedujo; 308. Andersson, S-ro Hjalmar, Arboga, Svedujo; 309. Andersson, S-ro Lars, Høje, Svedujo; 310. Asplund, F-ino Nannie, Eskilstuna, Svedujo; 311. Birgersson, S-ro Torsten, Rotebro, Svedujo; 312. Bjorklund, S-ro F., Floda, Svedujo; 313. Börjesson, S-ro Yngve, Sundsvall, Svedujo; 314. Colliander, S-ino M., Häfersten, Svedujo; 315. Ekbom, F-ino Anna, Boden, Svedujo; 316. Enström, F-ino M. L., Johanneshov, Svedujo; 317. Eriksson, S-ro Axel, Ramvik, Svedujo; 318. Hakansson, S-ro Hugo, Traryd, Svedujo; 319. Johansson, S-ro Erik, Norrköping, Svedujo; 320. Lagerkrantz, S-ro L., Falun, Svedujo; 321. Lidell, S-ro Ville, Uddevalla, Svedujo; 322. Lindbarg, S-ro Torsten, Prässebo, Svedujo; 323. Ljungberg, S-ino Astrid, Stockholm, Svedujo; 324. Lundin, Ing. Henry, Örebro, Svedujo; 325. Lundquist, F-ino Gurli, Ystad, Svedujo; 326. Nilsson, S-ro Teodor, Vattjom, Svedujo; 327. Ohlsson, S-ro Carl, Stockholm, Svedujo; 328. Olsson, F-ino Agda, Göteborg, Svedujo; 329. Olsson, S-ro Nils, Hörr, Svedujo; 330. Olsson, S-ro Olle, Lund, Svedujo; 331. Pahlsson, S-ro Herluw, Hässleholm, Svedujo; 332. Palmgren, S-ro Rune, Vällingen, Svedujo; 333. Persson, S-ro Olle, Trelleborg, Svedujo; 334. Rönnmark, S-ro Konrad, Skönsberg, Svedujo; 335. Sjöberg, S-ro Helge, Gnosjö, Svedujo; 336. Smith, S-ro Malte, Kävlinge, Svedujo; 337. Snarberg, S-ro Jack, Stockholm, Svedujo; 338. Söderbund, S-ro D., Kumla, Svedujo; 339. Stenberg, S-ro Bengt, Falkenberg, Svedujo; 340. Sundborg, S-ro Einar, Göteborg, Svedujo; 341. Tell, S-ro Leander, Norrköping, Svedujo; 342. Thermer, F-ino Sigbritt, Varnheim, Svedujo; 343. Tjäder, S-ro Bertil, Vällingby, Svedujo; 344. Turner, S-ro Fred, Linköping, Svedujo; 345. Wedholm, S-ino Anna, Uppsala, Svedujo; 346. Fox, S-ro J. S., Los Angeles, Usono; 347. Knox, S-ro Wm. A., Dalton, Usono; 348. Lucero, S-ro Frank S., San Carlos, Usono; 349. Nace, S-ro Paul E., Hyattsville, Maryland, Usono; 350. Neri, S-ro Raymond, Stafford Springs, Usono; 351. Sattley, S-ro Kirk, Woburn, Usono; 352. Simpson, S-ro W. P., Harrisburg, Usono; 353. Vineski, S-ro Richard T., Danville, Usono.

FONDAJO DOMO

S-ro Pedro Gonzalez, 7,50 gld., Hispanujo; F-ino M. E. V. Caetano, 50.— gld., Portugalujo.

POR VASTIGO DE LA AGADO

(Laŭ Estrara letero de 21-5-1962)
S-ro C. J. Jahn, Kopenhago, 12,50 gld., Danlando; S-ro L. Angevin, Le Cailar, 7,50 gld., Francujo; S-ro Ota Ginz, Kirjat Jam Bet, 10.— gld., Israelo; S-ro Gustav Bonvecchiato, Milano, 5.— gld., Italujo; D-ro J. Hamvai, 10.— gld., Nov-Zelando.

Entute ricevita la sumo de 13.878,95 gld.

DONACIOJ AL INTERNACIA ARTA TEATRO

H. Boffejon 37,50 gld., Ivy Muiers 3,75 gld., Elisabeth Robin 7,50 gld., H. Bakker 7,20 gld., R. Debernardi 3,75 gld., Miguel Manteca 7,35 gld., (al kiuj ni aparte petas pardonon pro la malfrua kvitancado en la revuo); S-ro J. B. Pedersen 3,50 gld., D-ro J. L. Tortel 3,50 gld., S-ino R. Tortel 3,50 gld., S-ro L. Pickel 3,50 gld., S-ro P. Møller 3,50 gld., D-ro P. Neergaard 3,50 gld., S-ro M. Jullien 7.— gld., S-ro J. Vilkki 7.— gld., F-ino M. Boulton 7.— gld., S-ro H. D. Neumann 3,25 gld., S-ro W. De Smet 3,68 gld., S-ro A. Koň 3,60 gld. S-ro R. Schinkel 4,51 gld., F-ino R. Pedersen 5,25 gld., Germ. Esp. Fervojoista Asocio 45,10 gld., S-ro K. J. Moberg 6,95 gld., Peninsula Esperanto-Klubo 89,75 gld., S. Pragano 6.— gld., de la 46-a U.K. 10.— gld., N. Rytjkov 3,58 gld., H. Bakker 4.— gld., S-ro P. Ronald 10,05 gld., S-ro B. B. Beaumont 3,50 gld.

Ankaŭ al la aliaj donacintoj, kiuj longe atendis kvitancadon, ni sincere petas pardonon pro la malfruiĝo, kies kaŭzo estis la eksterordinara situacio en la C.O. dum 1962.

La Direktoro de I.A.T. esprimas koran dankon al ĉiuj Amikoj de I.A.T.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

AVERTO - Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkokolektantojn.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA (adreso: K.S.M., 12, rue des Jacobins, Clermont-Fd (PdD) Francujo) kiu peras adresojn laŭ la regularo aperinta en Jarlibro 1962-a.

Ĉu toleremo estas naivaĵo? Ĉu malagrabloj povas esti utilaj por

la homo? Ĉu sufero havas nobligan efikon? Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F., Danlando.

Belga papiliokolektanto serĉas kontakton kun aliaj papilodiletantoj por interŝanĝi informojn kaj ekzemplerojn de papilioj. Magis Hubert, Oude Herenthoutse Steenweg 41, Herentals, Belgujo.

Skribu Amase salutojn al mia letervespero la 1-an de majo. Laŭ eblecoj sendu eĉ materialojn por preparata ekspozicio. Ĉiu certe ricevos respondon. Josef Kulkus, tr., Rudé armády 3, Bumperk.

Tri junuloj deziras korespondado kun la tuta mondo por interŝanĝi pmkojn. kaj pktjn. Skribu al S-ro Luis Hernandez, Duque de la Victoria 21, Valla-Dolid (Hispanujo).

Alvoko! Esperantistoj el Rochdale (Anglujo) Bottrop (Germanujo) estos bonakceptitaj en la ĝemeliga urbo de Tourcoing (Norda Francujo). Rendezuo okazos ĉirkaŭ la 15-a de oktobro 1963. Informojn liveros: Marcel Delcourt, U.E.A.-delegito, Parc des Francs, Tourcoing (Nord), Francujo. Nepre skribu!

KOREKTO

Kun granda bedaŭro ni konstatis, ke aperis presaro en la reklamo de INFE kaj de Naturista Vivo, en la februara eldono de Revuo Esperanto. La korektita adreso estu:

INFE, 1801 Page Street,
San Francisco 17,
California, Usono.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, kvanton kontraŭ kvanto, ĉiuj landoj. Respondo garantiata. M. J. E. Kat, Montfoortlaan 13 III, Utrecht, Nederlando.

E-Klubo aranĝos letervesperon 15.5. 1963. Bv. sendi salutaĵojn kaj proponojn al korespondado. Adreso: Esperanto-Klubo, Ludební škola, Ždár n/Sáz, Ĉeĥoslovakio.

Nur Interstene korespondas Masao Kakuo Moriyama-tyô (Toyama-ken) Takaoka (Japanujo) (Esperante).

Henk Valkenier, muzikredaktoro, deziras korespondi pri muziko kaj gramofondiskoj. Adreso: Parkflat, Akker 179, De Bilt, Nederlando.

Libertempa restado Bretonio - Apud marbordo - Pasko-Septembro - 3 ĉambroj - Duŝo - Necesejo - (Sendependa loĝejo) - Por informoj, skribi al: Tareau Yvon, Cigales, Plage Laudonnec-Loctudy, Finistère, Francujo.

Esperanto-Civito. Nombro de korespondintoj 81, donacintoj 35, vizitintoj 22, civitanoj 4, esperantistoj en Dovro 9. Vidu anoncojn en tri antaŭaj numeroj.

NOV-ZELANDA ĈAMBRO KOLEKTATA!

SUMO DE 2000 gld. JAM KOLEKTITA. DANKON AL NIAJ ANTIPODOJ!

PARTOPRENU EN SOFIO EN LA ORATORA KONKURSO DEKLAMKONKURSO FOTOKONKURSO

HELSINGÖR INVITAS VIN

21.—28.7.1963 okazos la feriaj Esperanto-kursoj: 1) konversacia, 2) perfektiga, 3) elementa laŭ naturmetodo, 4) prepara kurso por naturmetodaj geinstruistoj, 5) prelegoj literaturaj. Aliĝo antaŭ 20/6. Detala programo havebla ĉe

s-ro L. Friis,
Ingemannsvej 9,
Aabyhøj, Danlando.

FERIOJ (Svislando)

Kompleta komforta loĝejo 2-ĉambra (2 + 1 litoj) 1-a Majo - Sept. 30-a, rava regiono, lago Zuriĥa.

Pomonte sf. 900.—, duonmonate sf. 500.— (3 pers.)

Pomonte sf. 600.—, duonmonata sf. 350.— (2 pers.)

Skribu tuj por luado al S-ino Huber-Jaccard, PFAEFFIKON SZ. (Svislando).

ĜUO EN LA MARLAZURO

meze de la internacia Esperanto-familio

IDILIE PITORESKA KADRO

MODERNE EKIPITA TENDARO

BANADO, BARKVETURADO, VELBOATADO

SUBMARA FIŜKAPTADO

REFREŜIĜO EN AROMA PINIARO

UNIKA TURISTA OBSERVATORIO

PRIMOŜTENNO ATENDAS VIN!

FERIU ĈE ADRIATIKO EN NIA ESPERANTO-SOMERUMEJO

Senpaga dokumentado kaj informoj haveblaj de:

TURISMA OFICEJO, PRIMOŜTENNO/ŜIBENIKO, JUGOSLAVIO



ĴUS APERIS

Là lasta manuskripto de
D-ro L. L. Zamenhof

FABELOJ (kvara volumo) de H. C. Andersen

(tradukis: D-ro L. L. Zamenhof)

244 paĝoj — 53 originalaj ilustraĵoj de A. Uniechowski

Prezo: 3 \$ aŭ egalvaloro (plus 10% por sendkostoj)

Eldonis: Heroldo de Esperanto (Bruselo)

Mendu ĉe via Libro-Servo aŭ ĉe UEA